

Detlev Blanke
Interlingvistiko kaj
esperantologio:
vojoj al la faka literaturo

International languages
ESPERANTO-LINGVAJ
188993 Maria Gaudenzi, Germano...
188994 La lingvo Esperanto...
188995 Esperanto...
188996 Esperanto...
188997 Esperanto...
188998 Esperanto...
188999 Esperanto...
189000 Esperanto...
189001 Esperanto...
189002 Esperanto...
189003 Esperanto...
189004 Esperanto...
189005 Esperanto...
189006 Esperanto...
189007 Esperanto...
189008 Esperanto...
189009 Esperanto...
189010 Esperanto...
189011 Esperanto...
189012 Esperanto...
189013 Esperanto...
189014 Esperanto...
189015 Esperanto...
189016 Esperanto...
189017 Esperanto...
189018 Esperanto...
189019 Esperanto...
189020 Esperanto...
189021 Esperanto...
189022 Esperanto...
189023 Esperanto...
189024 Esperanto...
189025 Esperanto...
189026 Esperanto...
189027 Esperanto...
189028 Esperanto...
189029 Esperanto...
189030 Esperanto...
189031 Esperanto...
189032 Esperanto...
189033 Esperanto...
189034 Esperanto...
189035 Esperanto...
189036 Esperanto...
189037 Esperanto...
189038 Esperanto...
189039 Esperanto...
189040 Esperanto...
189041 Esperanto...
189042 Esperanto...
189043 Esperanto...
189044 Esperanto...
189045 Esperanto...
189046 Esperanto...
189047 Esperanto...
189048 Esperanto...
189049 Esperanto...
189050 Esperanto...
189051 Esperanto...
189052 Esperanto...
189053 Esperanto...
189054 Esperanto...
189055 Esperanto...
189056 Esperanto...
189057 Esperanto...
189058 Esperanto...
189059 Esperanto...
189060 Esperanto...
189061 Esperanto...
189062 Esperanto...
189063 Esperanto...
189064 Esperanto...
189065 Esperanto...
189066 Esperanto...
189067 Esperanto...
189068 Esperanto...
189069 Esperanto...
189070 Esperanto...
189071 Esperanto...
189072 Esperanto...
189073 Esperanto...
189074 Esperanto...
189075 Esperanto...
189076 Esperanto...
189077 Esperanto...
189078 Esperanto...
189079 Esperanto...
189080 Esperanto...
189081 Esperanto...
189082 Esperanto...
189083 Esperanto...
189084 Esperanto...
189085 Esperanto...
189086 Esperanto...
189087 Esperanto...
189088 Esperanto...
189089 Esperanto...
189090 Esperanto...
189091 Esperanto...
189092 Esperanto...
189093 Esperanto...
189094 Esperanto...
189095 Esperanto...
189096 Esperanto...
189097 Esperanto...
189098 Esperanto...
189099 Esperanto...
189100 Esperanto...

**INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTOLOGIO:
VOJOJ AL LA FAKA LITERATURO**

Detlev Blanke

ENHAVO

0	Antaŭrimarko	3
1	Interlingvistiko, planlingvoj, esperantologio	4
2	Monografioj, antologioj kaj konferencaktoj	7
3	Universitataj disertacioj kaj lernolibroj	10
4	Periodaĵoj pri interlingvistiko kaj esperantologio	11
4.1	Interlingvistikaj periodaĵoj	11
4.2	Esperantologiaj periodaĵoj	12
5	Bibliografioj	14
5.1	Interlingvistikaj superrigardaj bibliografioj	14
5.2	Specialaj interlingvistikaj bibliografioj	15
5.3	Internaciaj periodaj lingvistikaj bibliografioj	15
5.3.1	BL-CIP	16
5.3.2	BLL	16
5.3.3	MLA	17
5.3.4	LLBA	18
5.3.5	BL-CIP, BLL kaj MLA en komparo	18
5.4	Naciaj periodaj bibliografioj	20
5.5	Bibliografioj pri unuopaj lingvistikaj kampoj	20
5.6	Bibliografie orientitaj interlingvistikaj bultenoj	20
5.7	Bibliografiaj helpiloj por traserĉo de revuoj	21
5.7.1	Lingvistikaj revuoj	21
5.7.2	Esperanto-revuoj	22
5.8	Planlingvaj libro-katalogoj	23
6	Planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj	23
7	Interlingvistiko en elektronikaj medioj	25
8	Registro de interlingvistoj	27
9	Literaturo	28

RESUMO

Ne malmultaj publikaĵoj pri interlingvistiko kaj esperantologio povus esti pli altkvalitaj, se iliaj aŭtoroj havintus pli profundan konon de grava fak-literaturo.

Tamen, eĉ por fakulo ofte malfacilas orientiĝi kaj pri la aktualaj kaj pri pli malnovaj sciencaj studoj traktantaj diversajn aspektojn de planlingvoj ([“arte-faritaj”] mondaj [help]lingvoj). La studaĵo volas plifaciligi la aliron al fak-literaturo per atentigo pri la multspecaj materialfontoj, kiujn indas eluzi. Krom monografioj tio aparte koncernas malpli konatajn antologiojn, festlibrojn, konferencaktojn, universitatajn disertaciojn, krome iom novajn kaj malpli novajn planlingvajn periodaĵojn.

Por la aktuala informiĝo aparte gravas ĝeneralaj kaj specialaj interlingvistikaj bibliografioj, bibliografie orientitaj bultenoj kaj periode aperantaj internaciaj bibliografioj kun interlingvistikaj sekcioj. Plej rezultodona estas la bibliografio pri modernaj lingvoj kaj literaturoj, eldonata de Modern Language Association (MLA) en Novjorko, kiu ĉiujare registras la plej novajn materialojn.

Specialaj bibliotekoj, pli kaj pli elektronike konsulteblaj, disponigas grandajn esploreblajn materialkvantojn. Por la alirebligo de la faka literaturo la Interreto ludas kreskantan rolon.

INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTOLOGIO: VOJOJ AL LA FAKA LITERATURO

0. ANTAŬRIMARKO

Daŭre kreskadas la faka literaturo pri interlingvistiko kaj esperantologio. Orientiĝo pri ĝi fariĝas ĉiam pli malfacila eĉ por la fakulo, aparte se temas pri literaturserĉo pri pli specifaj problemoj. Por la startanto la situacio ofte estas aparte komplika, se li/ŝi volas verki ion vere novan. Pro tio eĉ en pli novaj publikaĵoj videblas, ke gravaj studoj foje restas nekonataj.

Do, iom larĝa enkonduko en la *materialtrovejojn* al mi ŝajnas utila. Ĉi-rilate necesas substreki, ke la sekva studaĵo *ne* estas komentita bibliografio. Tia bibliografio aspektus alie, kvankam bibliografiaj informoj ja multas. La studaĵo unuavice helpu orientiĝi pri tiuj lokoj kaj instrumentoj, per kiuj oni povas daŭre trovi la plej novajn bibliografiajn informojn kaj aliajn materialojn. La studaĵo do volas esti helpilo por plifaciligi memstaran orientiĝon pri la faka literaturo. Tion bibliografio ne povas ebligi, des pli, ĉar ĝi ĉiam estas subjektiva elekto el granda kvanto de literaturo.

En la teksto mi ofte atentigas pri la interlingvistikaj bultenoj *Intl* kaj *IpI* (vd. 5.6), ĉar la kono de ilia enhavo tre faciligas la trovon kaj prijuĝon de la literaturo.

Por atingi sufiĉe da internacieco kaj por eviti la danĝeron ignori gravajn materialojn, mi donis la malneton de la studo al kelkaj kompetentaj fakuloj, kiuj donis multajn utilajn korektojn kaj kompletigojn¹. Pri la fina versio, kiu certe havas ankoraŭ mankojn, mi mem plene respondecas.

¹ (Ĉi-tiu studo estas forte pliampleksigita kaj aktualigita varianto de la germanlingva studo “Wege zur interlinguistischen und esperantologischen Fachliteratur”, kiu unue aperis en *Language Problems & Language Planning* 20 (1996), No 2, p. 168-181 kaj poste en *Intl* 10[2001]1 (38); anglalingva versio de ĉi tiu studo aperis en *Language Problems & Language Planning* 28 (2003), No 2).

Por utilaj korektoj kaj sugestoj mi dankas al Věra Barandovská-Frank, Wera Blanke, Osmo Buller, Renato Corsetti, Sabine Fiedler, Martin Haase, Wim Jansen, KIM Uson, Ino Kolbe, Ilona Koutny, Andreas Künzli, Sergej Kuznecov, Jouko Lindstedt, Ulrich Lins, LIU Haitao, Cornelia Mannewitz, Geraldo Mattos, Roy McCoy, Aleksandr Melnikov, Carlo Minnaja, Marc van Oostendorp, Otto Prytz, Árpád Rátkai, Humphrey Tonkin, USUI Hiroyuki, Balázs Wacha, YAMASAKI Seikō.

1. INTERLINGVISTIKO, PLANLINGVOJ, ESPERANTOLOGIO

Sub *interlingvistiko*² mi ĉi tie komprenas la scienccon pri la optimumigo de la internacia lingva komunikado. Ĝia tradicia kerna kampo estas la scienco pri planlingvoj aŭ ‘interlingvoj’³. Tiu ĉi okupiĝas pri la kreado, strukturo, funkcio, evoluo kaj aplikado de planlingvoj⁴.

*Planlingvoj*⁵ estas lingvoj, konscie kreitaj laŭ difinitaj kriterioj por – almenaŭ en plej oftaj kazoj – la plifaciligado de la internacia komunikado (ankaŭ nomataj – kvankam kun certaj signifodiferencoj – [*internaciaj*] *artefaritaj lingvoj*, [*artefaritaj*] *mondaj [help]lingvoj*, [aparte en la 18-a kaj 19-a jarcentoj] *universalaj lingvoj*). Oni ankoraŭ ne sufiĉe esploras ilin kiel funkcikapablajn internaciajn interkomprenilojn.

Interlingvistiko entute ludas ĝis nun nur malgrandan rolon en la lingvosciencia diskuto, kiel montras konatiĝo kun multaj superrigardaj verkoj kaj manlibroj de lingvistiko.

Tamen ekzistas aro da lingvistikaj verkoj, kiuj ja mencias interlingvistikajn temojn, tamen nur malofte en sufiĉa kvanto kaj kvalito. Ne eblas ĉi tie doni detalajn ekzemplojn. Tion mi faris aliloke (Blanke 1995). El inter la pozitivaj esceptoj menciindas la ampleksa hungara manlibro pri lingvoj de Fodor (2000) kaj germana/angla multvoluma serio de ampleksaj lingvistikaj manlibroj.⁶

² Pri la aktuale malsamaj limigoj de la objekto de interlingvistiko (limigo al ‘planlingvo-scienco’, ‘scienco pri internaciaj komunikiloj, interlingvoj’, aŭ inkludo de pliaj, i.a. lingvopolitikaj aspektoj) vd. la superrigardojn ĉe Schubert (1989b), Blanke (1998c) kaj Sakaguchi (1998).

³ Parolante pri ‘interlingvoj’ kiel internaciaj komunikiloj necesas atenti, ke ‘interlingua’ en la didaktika literaturo pri alproprigo de fremdaj lingvoj signifas plimalpli lingvo, kiu elformiĝas en la menso de lernanto.

⁴ Kvankam laŭ mi lingvopolitikaj aspektoj estas gravaj elementoj de moderna interlingvistiko, en ĉi tiu studo pro metodologiaj kialoj la literaturo pri la planlingvo-teorio kaj esperantologio ricevas la ĉefan atenton.

⁵ Pri la termino, kreita de Eugen Wüster (1931) pli precize vd. Blanke (1997). La termino kutime uzatas en la interlingvistika fakliteraturo, sed ne rilatas al etno-lingvoj, influitaj per lingvo-planado (kiel ekz. la norvega Landsmål/Nynorsk, la Novhebrea/Ivritu, Bahasa Indonesia, ‘Unuigita Euska’ [Euskara Batua] k.a.).

⁶ Manlibroj pri lingvistiko kaj komunikado-scienco (Handbücher zur Sprach- und Kommunikationswissenschaft, HSK/Handbooks of Linguistics and Communication Science), aperanta en la eldonejo de Gruyter (Berlin-New York) ankaŭ troviĝas kelkaj interlingvistikaj ĉapitroj. Ĝis nun aperis:

Vol. 3 (Soziolinguistik/Sociolinguistics), Subvolumo 1(1987): Alicja Sakaguchi, Welthilfssprachen, p. 365-370; Subvolumo 2 (1988): Pierre Janton, Plans for an International Language, p. 1679-1687;

Ĉi tiu abstino estas bedaŭrinda kaj laŭ mi perdo por la lingvistika scio-kresko. Interlingvistikaj kaj esperantologiaj problemontroj ja povas kontribui al la kontrolo de vico da bazaj lingvistikaj konceptoj, ĉar, rigardataj per la specifa prismo, ili ricevas aldonan aspekton.

Interlingvistikaj vidpunktoj donas instigojn ankaŭ por esploroj en najbaraj disciplinoj. Tio koncernas ne nur la principan demandon pri la funkci- kaj evolukapablo de konscie kreitaj lingvoj – kio ja devus interesi la ĝeneralan lingvistikon – sed ankaŭ *bazajn demandojn de la teorio de lingvo-planado* (language planning)⁷, *lingvo-ŝanĝiĝo*⁸, *esplorado de faklingvoj*⁹, *komputa lingvistiko* (inkluzive maŝinan tradukadon)¹⁰ kaj la *teorio de fremdlingva instruado*¹¹.

Vol. 5 (Wörterbücher/Dictionaries), Subvol. 3 (1991): Reinhard Haupenthal, Lexikographie der Plansprachen, p. 3120-3137;

Vol. 7 (Sprachphilosophie/Philosophy of Language), Subvol. 2 (1996): Vivian Salmon, The Universal Language Problem, p. 916-928;

Vol. 12 (Kontaktlinguistik/Contact Linguistics), Subvol. 1(1996): Otto Back, Plansprachen, p. 881-887;

Vol. 14 (Fachsprachen/Languages for Special Purposes), Subvol. 1 (1998): Detlev Blanke/Wera Blanke, Plansprachen als Fachsprachen, p. 875-880;

Vol. 18 (Geschichte der Sprachwissenschaften/History of the Language Sciences), Subvol. 1 (2000): Jaap Maat/David Cram, Universal Languages Schemes in the 17th Century, p. 1030-1043;

Vol. 20 (Sprachtypologie und sprachliche Universalien/Language Typology and Language Universals), Subvol. 1 (2001): Heiner Böhmer, Künstliche Sprachen und Universalsprachen, p. 85-94.

Kontribuoj krome aperos almenaŭ en jenaj volumoj.

Vol. 17 (Morphologie/Morphology), Subvol. 2 (Blanke);

Vol. 21 (Lexikologie/Lexicology), Subvol. 2 (Blanke);

Vol. 13 (Semiotik/Semiotics), Subvol. 3 (Peter Mühlhäusler).

⁷ Tauli (1968) klare atentigis pri la rilatoj inter lingvo-planado kaj planlingvoj. Certe ne estas hazardo, ke la revuo “Language Problems & Language Planning” (la antaŭulo havis la esperantan titolon “La Monda Lingvo-Problemo” 1969-1977), internacie rekonata faka revuo, estas fondita kaj aktuale redaktata de interlingvisto.

⁸ Ĉe Esperanto ekz. exploreblas, kia lingvo-ŝanĝiĝo okazis inter la etapoj ‘publikigo de la projekta skizo (1887)’ kaj (aparte post la Dua Mondmilito) ‘Esperanto kiel familia lingvo’.

⁹ Vd. la bibliografion ĉe Blanke (1998a) pri Esperanto kiel faka lingvo kaj pri la heŭristika rolo de Esperanto en la verko de Eugen Wüster, la fondinto de la terminologio-scienso (Blanke 1998b).

¹⁰ Vd. la superrigardojn ĉe Schubert (1996,1999) kaj Liu (2001).

¹¹ Pri la propedeŭtika efiko de la instruado de planlingvo por la lernado de aliaj fremdlingvoj vd. Lobin (2002), kaj la superrigardojn ĉe Corsetti/La Torre (1995, 2001) pri la diversaj ĉi-rilataj eksperimentoj; vd. ankaŭ Fantini/Reagan (1992).

Ankaŭ ne subtakseblas *lingvopolitikaj aspektoj*¹², aparte la problemoj de *samrajta, sendiskriminacia internacia komunikado* kaj problemoj de la *interkultura komunikado*, kiuj trovas la intereson de interlingvistoj.

Apartan aspekton montras la ligoj inter *aziaj lingvo-reformaj movadoj* (ĉina kaj japana) kaj Esperanto, traktitaj en la japana revuo “Hokusaigo Kenkyo” (Studoj pri la lingvo internacia, Tokio 1933-1936, redaktoro Osima Yosio).

Por povi bone kompreni la fenomenon de reale funkcia planlingvo, oni devas *distingi inter projekto kaj lingvo*. Ĉi tiu distingo ofte ne estas farata, kaj al planlingvo oni atribuas ecojn, kiuj validas nur por *projekto*¹³. Krom tio oni pretervidas, ke planlingvo unuavice servu kiel ‘*lingua franca*’, kio ekskludas kelkajn funkciojn, ekz. tiun de ‘nacia lingvo’, ‘ŝtata lingvo’, kiujn oni ofte havas ĉe etno-lingvo.

Por *Esperanto*, la ĝis nun plej sukcesanta planlingvo, evoluis memstara lingvistika-filologia disciplino, la *esperantologio* (angle: Esperanto studies, Esperantic studies, esperantology)¹⁴.

Se oni komprenas iom vaste ĝian objekton, ĝi esploras la fontojn, konstru-principojn, evoluon, funkciadon kaj praktikajn komunikajn kapablojn de ĉi tiu planlingvo. Al ĝia objekto apartenas ankaŭ la esplorado de la esperanta lingvo-komunumo, kiu ekzistas kvazaŭ en diasporo, kaj ties historio¹⁵.

La esperantologio rigardeblas subdisciplino de interlingvistiko, se oni komprenas ties objekton vaste.¹⁶

¹² I.a. vd. Fettes/Bolduc (1998), Hübler (1985), Mattusch (1999), Phillipson (1992, 2003), Piron (1994) kaj Skutnabb-Kangas (2000), kiuj inkludas interlingvistikajn vidpunktojn en siajn analizojn.

¹³ Mi klopodis videbligi tiun diferencon (Blanke 2001). Vd. ankaŭ la aliajn kontribuojn ĉe Schubert (2001).

¹⁴ Neergaard (1942/79) verkis la unuan bibliografion pri esperantologia literaturo. Gravaj bazaj esperantologiaj verkoj estas i.a. de Gledhill (2000), Janton (1993a,b), Manders (1950), Nuessel (2000) kaj Wells (1978, 1987). Janton kaj Wells estas tradukitaj en kelkajn lingvojn. Krom tio ekzistas multaj studoj, kiuj traktas unuopajn aspektojn de la lingvo. Ekz. Fiedler (1999, 2002) fondis la frazeologio-esploradon kiel subdisciplinon de esperantologio.

¹⁵ La lingvokomunumo de Esperanto estis esplorata i.a. en la verkoj de Forster (1982), Lins (1988a, 1988b), Stocker (1996) kaj Rašić (1994). Pri la historio de la laborista Esperanto-movado i.a. vd. Borsboom (1976), Kolbe (1996) kaj Noltenius (1993). Bibliografio pri la historiografio de la esperanta lingvo-komunumo troviĝas ĉe Blanke (2000).

¹⁶ Kvankam interlingvistiko inkludas esperantologion, mi foje aparte mencias esperantologion. Ja ĉiu esperantologia laboraĵo samtempe ankaŭ estas interlingvistika, sed tio ne validas inverse. Kaj sekve ne ĉiu interlingvisto estas esperantologo.

Por aliaj planlingvaj sistemoj ne evoluis kompareblaj memstaraj filologioj. Tamen ilia esploro ja estas de scienca intereso.

La aliro al interlingvistika-esperantologia fakliteraturo por nefakulo ofte estas tre malfacila. Laŭ miaj taksoj tia literaturo ekzistas je eble 60-70% en *planlingvoj* (de tiuj ĉ. 90% en Esperanto)¹⁷. Sekve lingvistoj, se ili foje tamen esprimas sin pri interlingvistikaj temoj, ofte bazas siajn eldirojn sur hazarde trovitaj kaj ne ĉiam aktualaj fontoj. Tial iliaj eldiroj fariĝas nekontentigaj aŭ eĉ malĝustaj¹⁸.

Kiel konate, traserĉo de la literaturo ja ĉiam devas esti ĉe la komenco de scienca studo. Tio ankaŭ validas por interlingvistiko. Al tio apartenas la utiligo de la fakliteraturo, verkita en Esperanto.

Dum la lasta jardeko observeblas, ke en kelkaj sciencoj oni neadekvate sin apogas antaŭ ĉio je angla-lingva literaturo kaj ne plu konsideras alilingvajn publicaĵojn. Tio havus fatalajn sekvojn por la interlingvistiko, ĉar por ĉi tiu scienco multaj valoraj publicaĵoj, kiuj estas utiligendaj, i.a. ekzistas aparte en la germana, rusa, itala, franca kaj hungara lingvoj.

Pro tio en la sekva parto mi klopodas montri kelkajn vojojn al la fakadekvata informiĝo pri la rezultoj de interlingvistiko kaj esperantologio. Ĉe tio, krom monografioj, antologioj kaj periodaĵoj mi mencias ankaŭ bibliografiojn kaj arkivojn, kaj atentigos pri la graviĝanta rolo de la Interreto por la literaturserĉo.

2. MONOGRAFIOJ, ANTOLOGIOJ KAJ KONFERENCAKTOJ

Unuajn informojn pri planlingvoj oni kutime trovas en *naciaj enciklopedioj* (ekz. Encyclopedia Britannica, Brockhaus-Enzyklopädie k.s.) aŭ en *lingvistikaj vortaroj/leksikonoj*. Foje oni tie ankaŭ trovas mencion de faka literaturo. Tamen, ĝenerale la tie troveblaj informoj ne kontentigas, havas erarojn aŭ eĉ nutras disvastigitajn mitojn kaj antaŭjuĝojn.

La grava fakliteraturo troviĝas ne nur en kreskanta nombro da *monografioj*¹⁹,

¹⁷ Vidu ankaŭ 5.3.5.

¹⁸ Ekz. ĉe Bußmann (2002). Vd. la artikolojn pri Ido, Interlingua, Welthilfssprache. Artikolo pri Esperanto, pri kiu oni atentigas en la aliaj artikoloj, mankas. Ĉe Glück (2000) interlingvistiko estas pli bone reprezentita. Ankaŭ Haarmann (2001), kvankam kun malnovaj fontoj, citeblas kiel pozitiva ekzemplo.

¹⁹ Al la plej gravaj interlingvistikaj superrigardaj verkoj apartenas tiuj de Albani/Buonarroti (1994), Barandovská-Frank (1995), Bausani (1970), Blanke (1985), Couturat/Leau (1903/2001), Drezen (1931/91), Duliĉenko (1990), Eco (1993), Knowlson (1975), Kuznecov (1987), Large (1985), Libert (2000, 2002), Maat (1999), Monnerot-Dumaine (1969), Pei (1968), Sakaguchi (1998), Stillman (1995), Strasser (1988) kaj Szerdahelyi (1977).

sed ankaŭ en malpli konataj *antologioj* (inkluzive *festlibroj* kaj *konferencaktoj*)²⁰.

La verkoj de kelkaj gravaj interlingvistoj kaj esperantologoj, troviĝantaj en specialaj planlingvaj revuoj aŭ en aliaj nur malfacile alireblaj fontoj, parte aperis en kolektaj verkoj. Tio unuavice koncernas la iniciatinton de Esperanto, Ludoviko L. Zamenhof²¹, sed ankaŭ Atanas D. Atanasov (1983), Kálmán Kalocsay²², Gaston Waringhien (ekz. Waringhien 1989) kaj Juan Régulo Pérez (1992).

Materialriĉaj *manlibroj*, aparte pri la praktiko de Esperanto, informas pri la komencoj de la lingvo ĝis fino de la 70-aj jaroj²³.

Kelkaj interlingvistikaj konferencoserioj rezultigis la publikigon de *konferencaktoj*.

Aparte menciindas la materialoj de la *interlingvistikaj kolokvoj* en la universitato de Tartu²⁴ (Estonio) kaj de Łódź²⁵ (Pollando), krome la aktoj de interlingvistikaj simpozioj, kiujn dum la 70-aj kaj 80-aj jaroj organizis la Asocio de Polaj Studentoj (Związek Polskich Studentów)²⁶. La Centro por Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED, angle Center for Research and Documentation on World Language Problems) dum la 80-aj jaroj

²⁰ Al la plej gravaj antologioj kaj festlibroj apartenas tiuj de Benczik (1999), Blanke (1986), Duc Goninaz (1987), Fiedler/Liu (2001), Haupenthal (1976, 1985, 1989, 1989 = Menade..., 1998), I. Haupenthal/R. Haupenthal (2000), Isaev (1976; 1991), Mattos (1987), Minnaja (2002), Régulo Pérez (1987 = Serta Gratulatoria), Schubert (1989a, 2001), Szerdahelyi (1980) kaj Vitali (1998).

²¹ La japano Itô Kanzi, sub la pseŭdonimo Ludovikito, de 1973-1997 kolektis en pli ol 50 verkoj ĉiujn publikaĵojn de Zamenhof kaj tiujn materialojn, kiuj estiĝis sub la influo de Zamenhof (vd. Esperanto-katalogo... 2001, p. 71-72).

²² Ada Csiszár ĝis mezo de 2003 publikigis ok volumojn kun interpretoj, recenzoj, specimenoj k.s. pri la verkaro de Kálmán Kalocsay.

²³ Ĉi tie aparte menciindas Enciklopedio de Esperanto, kiu kovras la tempospacon de la komencoj de Esperanto (1887) ĝis la komenco de la 1930-aj jaroj (Kökény/Bleier 1933-34/79). Pli nova enciklopedia verko aperis en 1974 (Lapenna/Lins/Carlevaro). Krom tio estas utila la kolekto dulingva (Esperanto/angla) de diversaj studoj kolektitaj de Eichholz/Eichholz (1982).

²⁴ De 1982-1990 Aleksandr D. Duliĉenko eldonis sep volumojn de la serio Interlinguistica Tartuensis (pli precize vd. en *Intl* 40, *Ipl* 42).

²⁵ Inter 1981-1986 Tadeusz Ejsmont en Łódź eldonis ses volumojn de la serio Międzynarodowa komunikacja językowa (vd. *Intl* 45; *Ipl* 43).

²⁶ Bedaŭrinde el la 14 kolokvoj nur de tri aperis la aktoj. La Acta Interlinguistica de la 11-a (1983), 12-a (1984) kaj 13-a (1985) interlingvistikaj simpozioj estis eldonitaj de Ryszard Rokicki.

en Usono okazigis kelkajn lingvo-politike orientitajn konferencojn, kies aktoj aperis kiel mimeografiaj eldonaĵoj²⁷.

Ankaŭ la germana “Gesellschaft für Interlinguistik e.V.”, GIL (Societo pri Interlingvistiko) ekde sia 5-a konferenco (1995) eldonas siajn aktojn kiel “Kromkajerojn (Beihefte) al Interlinguistische Informationen” (*IntI*, vd. 5.6)²⁸.

Interesaj studoj, ofte traktantaj problemojn de la *faka lingvo en Esperanto*, troviĝas aparte en la serio de konferencaj aktoj de la serio SAEST (Simpozio pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tehniko)²⁹, organizita de la Esperanto-Asocioj Ĉeĥa kaj Slovaka.

Antaŭ nelonge aperis aktoj pri historie aparte interesa konferenco, tiu de International Auxiliary Language Association (IALA), kiu en Ĝenevo (1930) diskutigis pri la problemoj de internacia planlingvo (auxiliary language) lingvistojn kiel Earl Babcock, Charles Bally, Otto Jespersen, William Collinson, Albert Debrunner, Otto Funke, Eduard Hermann, Albert Sechehaye kaj la fraton de Ferdinand de Saussure, René de Saussure (Perrenoud 2002).

Multajn esperantologiajn studojn Rüdiger Eichholz prenis en la serion “Akademiaj Studoj”.³⁰ Malmulte konatas la kvar volumoj de la serio “Kontribuoj al lingvaj teorio kaj praktiko”, kiujn eldonis de 1983-1986 Slovaka Esperanto-Asocio (redaktis Stanislav Košecký, vd. *Ipl* 46). Ekde 1997 aperas la aktoj de la Internacia Kongresa Universitato kadre de la Universalaj Kongresoj de Esperanto³¹. Tro malofte aperas la aktoj de la serio de Esperantologiaj Konferencoj, kiu startis en 1978 (vd. Blanke 2001b).

²⁷ Iin eldonis i.a. Humphrey Tonkin. Tiuj kaj aliaj materialoj parte eniris la serion Papers of the Center for Research and Documentation on World Language Problems, same redaktita de Humphrey Tonkin. Ĝis 2002 aperis 5 volumoj (vd. Tonkin 1997, kaj vd. la aliajn titolojn en *Ipl* 8-9, *IntI* 9-11).

²⁸ Ĝis la fino de 2002 aperis ok volumoj kun jenaj (originale germanaj) kadraj temoj: Tradlatado [= tradukado kaj interpretado-DB] kaj planlingvoj (1996 = eldonjaro de la aktoj), Terminologisciencaj aspektoj de interlingvistiko (1997), Unu lingvon por la scienco – Memora kolokvo pri Wilhelm Ostwald (1998), Sociokulturaj aspektoj de planlingvoj (1998), Interlingvistiko kaj leksikografio (1999), Lingvopolitiko en Eŭropo (2001), Pri la strukturo de planlingvoj (2001), Planlingvoj kaj iliaj komunumoj (2002). Vd. ankaŭ *Ipl* 38, *IntI* 40 kaj la recenzon de Renato Corsetti en “*Esperantologio – Esperanto Studies*”, 3, 2003).

²⁹ Vd. la superrigardon pri la historio de la aranĝaro ĉe Pluhař (1999). En 1996 la serio reaperis sub la nomo KAEST (Kolokvo/Konferenco pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tehniko). Aperis tri konferencvolumoj (Malovec 1999, Pluhař 2001, Pluhař 2003).

³⁰ Aperis la volumoj 1983 (201 p.), 1984 (135 p.), 1985 (318 p.), 1986 (298 p.), 1987 (203 p.) kaj 1988-90 (560 p.).

³¹ Vd. ekz. Lipari (1999, 2000, 2001), McCoy (2002) kaj Wandel (1998).

Krome materialoj de gravaj interlingvistikaj aranĝoj estas redaktitaj de Carlevaro (1998), Chrdle (1995), Geccsó/Varga-Haszonits (1998), Kiselman/Mattos (2001), Košecký (1987, 1990), Koutny/Kovács (1977), Maitzen/Mayer/Tišljar (1994) kaj Umeda (1987).

3. UNIVERSITATAJ DISERTACIOJ KAJ LERNOLIBROJ

Pli kaj pli ofte en universitatoj de diversaj landoj oni verkas *diplomlaboraĵojn, doktorigajn kaj alitipajn disertaciojn* pri interlingvistikaj temoj. La unuan ĉi-teman bibliografion verkis Symoens (1989, 1995)³², kiu montras, ke la kvanto de tiaj disertacioj salte kreskas ekde la mezo de la 70-aj jaroj. Bedaŭrinde la superrigardo ne estas kompleta, ĉar mankas signifa nombro de diplomlaboraĵoj verkitaj ekde la ekzisto de la fako Esperanto (1966) en la Universitato Eötvös Loránd Budapest. Kelkaj el la plej gravaj doktorigaj disertacioj estis publikigitaj³³. Nur malmultaj habilitaciaj disertacioj ĝis nun estis akceptitaj de universitatoj³⁴.

Altlernejajn instrulibrojn por interlingvistiko kaj esperantologio ĝis nun verkis aparte István Szerdahelyi, kiu instruis la fakojn de 1966-87 en la kadro de la Katedro pri Aplika Lingvistiko en la Universitato Eötvös Loránd en Budapest³⁵. Lernolibroj pri interlingvistiko, destinitaj al universitata instruado, krome aperis de Barandovská-Frank (1995), Bormann (1995) kaj Kuznecov (1982 a,b).³⁶

³² En la bibliografiaj bultenoj *IntI* kaj *Ipl* (vd. 5.6) oni informas pri novaj altlernejaj disertacioj, se ili fariĝis konataj al la redaktisto.

³³ Ekzistas kreskanta kvanto da doktorigaj disertacioj. Mi nur mencias la presitajn, inter kiuj estas tiuj de Bak (1991), Blanke (1981), Corret (1908), Fauvart-Bastoul (1902), Forster (1982), Hagler (1970), Heil (1999), Marie-Thérèse Lloancy (1985), Lobin (2002), Lo Jacomo (1981), Maat (1999), Melnikov (1990), Papaloizos (1992), Philippe (1991) kaj la jam klasikaj disertacioj de Wüster (1931) kaj Manders (1947).

³⁴ Verŝajne nur tiuj de Blanke (1985, Humboldt-Univ.), Sakaguchi (1998, Univ. Poznań) kaj Fiedler (1999, Univ. Leipzig), ĉiuj en la germana. Verkado de habilitaciaj doktorigaj disertacioj, aparte en meza Eŭropo, estas necesa post la unua doktoreco (post la angla PhD), por akiri la plej altan universitatan instruarjon (Facultas docendi aŭ Venia legendi), kondiĉo por nomumiĝo al (privat-) docento kaj poste al (universitata) profesoro.

³⁵ La ok instrulibroj (en la hungara kaj Esperanto) traktas la historion de planlingvoj, teoriajn problemojn de interlingvistiko, la lingvon Esperanto (gramatiko, literaturo) kaj la metodikon de la instruado de la planlingvo. Inter 1976 kaj 1977 krome aperis tri eldonoj de “*Esperantologiaj kajeroj*”.

³⁶ Menciindas nederlandlingva lernolibro de Wim Jansen (aperonta 2003).

4. PERIODAĴOJ PRI INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTOLOGIO

En la sekva parto mi mencias kelkajn periodaĵojn, gravajn por la literatur-esplorado.

4.1. Interlingvistikaj periodaĵoj

Ĝis nun ne ekzistas regule aperantaj *sciencaj fakrevuoj*, dediĉitaj plene al interlingvistiko kaj redaktitaj laŭ la kutimaj rigoraj kriterioj. Tamen vico da malgrandaj periodaĵoj, tre malsamaj laŭ kvalito, amplekso kaj aperdaŭro, ebligis sekvi la diskuton pri interlingvistikaj demandoj, aparte pri unuopaj planlingvaj sistemoj. Duliĉenko (1990: 436-437) mencias ĝis 1973 entute 30 el tiaj periodaĵoj. La listo ne estas kompleta.

Fine de la 19-a jarcento, nur mallongan tempon sed kun riĉa materialo, aperis la revuo *Linguist* (Hannover, 1896-1897, ĉ. 400 p., redaktoro Max Wahren).

Al la plej gravaj periodaĵoj, kiuj aperis en la unua duono de la 20-a jarcento, apartenas la revuoj *Discussiones. Academia pro Interlingua* (Torino 1909-1913, redaktoro Giuseppe Peano), *Academia pro Interlingua* (Torino 1921-1927, redaktoro Giuseppe Peano), *Schola et Vita*. Ekde 1928 *Organo de Academia pro Interlingua* (Milano 1926-1939, redaktis Instituto pro Interlingua, direktoro Nicola Mastropaolo) kaj *Tolero* (Paris 1928-1930, redaktoro E. Dayras; 1931-1936 daŭrigita kiel *Interlanguages*, redaktoro E. Mauney)³⁷. En tiuj revuoj aperis artikoloj en diversaj planlingvoj. Krome menciindas *Novialiste* (en Novial de Jespersen, Stockholm 1934-1939, redaktoro Per Ahlberg) kaj *Mondo* (1912-1929, Stockholm, en Ido kaj Novial).

Post la dua mondmilito la plej grava neesperantista interlingvistika revuo estis *The International Language Review, ILR (A Clearing House for Facts, Theories and Fancies on the History, Science and Bibliography of International Language Movement)*, de 1955-1968 eldonita en 50 kajeroj de Floyd kaj Evelyn Hardin, Denver/Usono³⁸.

Por fakulo kun fona scio ankaŭ la bulteno *Union* (1971-1976),³⁹ entenas certajn utilajn informojn, kaj pri reformproponoj rilate Esperanton, *Nova Provo* (1991-2003, redaktoroj Roy McCoy kaj Claus Gunkel).

³⁷ Pri tio ankaŭ vidu Silagi (1996), kiu eldonis de 1929-1930 en Budapeŝto, en la latina, la periodaĵon *Communicationes (Libelli pro historia et scientia interlinguarum)*.

³⁸ La posteuloj de *The International Language Review*, sed kun multe malpli da interlingvistika enhavo, estis *International Language Reporter* (1969-1979) kaj *Ecolagos* (1971-1979), eldonitaj de John W. Ragsdale, Denver (vd. Golden 1993).

³⁹ “Organ oficial del Union International de Interlinguistik Service”, Amsterdam, eld. de W. J. Visser. La titolo de la bulteno estas en Eurolatin. En *Union* aperis kontribuoj en diversaj planlingvoj, entute 22 bultenetoj kun 274 paĝoj.

La informilo, eldonita en 1991, pri la planlingva projekto *Vorlin* de Richard Harrison (Orlando/Usono), ekde 1992 fariĝis la *Journal of Planned Languages*. Ĝis 1996 aperis 24 kajeroj. Inter 1995 kaj 2003 aperis tri kajeroj de *Journal of Universal Language*, eldonita de la universitato en Sejong, Suda Koreio⁴⁰.

Pli orientita je Esperanto kaj redaktita de Artur Bormann (Reinbek/Hamburg) sub lingvo-politikaj kaj sociologiaj vidpunktoj estis *Interlingvistika Informa Servo*, eldonita de Gesellschaft für Internationale Sprache e.V. (Societo pri Internacia Lingvo). De 1964-1984 aperis 84 kajeroj.

De signifo estis ankaŭ la esperantlingva planlingvo-teoria revuo *Planlingvistiko* el La Chaux-de-Fonds (Svisio). Ĝin redaktis Jouko Lindstedt (1981-83) kaj György Nanovszky (1984-86). Entute aperis 17 kajeroj.

Planita kiel sociolingvistike kaj lingvopolitike orientita fakrevuo pri problemoj de la internacia lingva komunikado de 1969-1977 aperis ĉe Mouton (Den Haag) revuo kun la esperantolingva nomo *La Monda Lingvo-Problemo*, *LMLP* (redaktoroj: Victor Sadler, Richard Wood) kun 18 kajeroj. Ekde 1977 ĉi tiu revuo ŝanĝiĝis al *Language Problems & Language Planning*, *LPLP*, (redaktita ĝis 1984 de Richard Wood, poste de Humphrey Tonkin [1984-], al kiu poste aliĝis Probal Dasgupta [1990-], Klaus Schubert [1990-97] kaj Marc van Oostendorp [1998-99]. Frank Nuessel dum la tuta tempo estis recenza redaktoro). *LPLP* aperis unue ĉe Mouton (Den Haag), poste ĉe University of Texas Press (Austin) kaj ekde 1990 ĉe Benjamins (Amsterdam). Ĝi regule enhavas interlingvistikajn kontribuojn⁴¹, recenzojn kaj informojn. Tio ekde la 70-aj jaroj validas ankaŭ por la klerig-kibernetike orientita revuo *Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft/Humankybernetik*, *grkg* (Eldonantoj: Helmar Frank, Miloš Lánský, Manfred Wettler). Ambaŭ revuoj okaze publikigas kontribuojn ankaŭ en Esperanto (*grkg* pli ofte ol *LPLP*) kaj ĉiam resumojn en la planlingvo.

4.2. Esperantologiaj periodaĵoj

La unua periodaĵo, kiu antaŭ la dua mondmilito aperis aparte por la publikigo de esperantologiaj studoj, estis *Lingva Kritiko* (*Studoj kaj notoj pri gramatiko, vortaro, stilo*). De 1932-1935 aperis 27 eldonoj kiel aldonaĵo por *Heroldo de Esperanto* (Horrem/Kolonjo), sub la redakto de Bruno Migliorini kaj Stefano La Colla.

Ekzistas nur du provoj, eldoni esperantologian fakrevuon laŭ internacie kutimaj sciencaj kriterioj. Bedaŭrinde la unua provo ne longe daŭris.

⁴⁰ Pri la enhavo vidu *Intl* 45.

⁴¹ Ekde meze de la 90-aj jaroj *LPLP* ankaŭ havas specialan interlingvistikan sekcion, kiun redaktas Mark Fettes.

Paul Neergaard (Kopenhago) inter 1949 kaj 1964 redaktis entute 5 kajerojn de la revuo *Esperantologio* (*Internacia Revuo por la lingvistiko kaj bibliografio de Esperanto*). La kontribuoj aperis ĉefe en Esperanto, sed ankaŭ en la angla kaj (malofte) en la franca. Nova paŝo en la saman direkton kiel daŭrigo de la iniciato de Neergaard estas la revuo *Esperantologio – Esperanto Studies* (EES), kiun ekde 1999 eldonas kaj redaktas Christer Kiselman (Uppsala)⁴².

Esperantologiajn studojn enhavas ankaŭ la bulteno *La letero de l' Akademio de Esperanto* (Parizo), kiu aperis 1987-1995 kun 31 kajeroj. Ĝin eldonis la societo “La Amikoj de l' Akademio de Esperanto”, proksima al la Akademio de Esperanto (redaktis Jean Thierry).

Plue menciendas kelkaj kajeroj de *Printempa Kampo* (*Jara revuo pri esperantologio, Esperanta faklingviko kaj interlingviko*), kiu dum kelkaj jaroj aperis neregule ekde 1989 en Dalian (PR Ĉinio) kaj entenas esperantologiajn kontribuojn nur de ĉinaj esperantologoj⁴³.

Japana Esperanto-Instituto planis eldoni revuon sub la titolo “*Japana Esperantologio. Bulteno de Japana Esperanto-Instituto*”. Aperis ĝis nun nur unu kajero (1, aŭgusto 1992, 92 p.).

Kvazaŭperiodaĵoj estas la serioj de *Esperanto-Dokumentoj*. Ili entenas studojn kaj dokumentojn pri la teorio kaj praktiko de la planlingvo kaj estas neregule eldonataj de Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo. Aperas serioj en Esperanto (ĝis majo 2003: 38 kajeroj), en la angla (46 kajeroj) kaj en la franca (28 kajeroj)⁴⁴.

Seriojn de publikaĵoj ankaŭ eldonas kelkaj naciaj Esperanto-institutoj, i.a. la Germana Esperanto-Instituto⁴⁵ kaj la Grupo Esperantologio/Interlingvistiko ĉe la Itala Esperanto-Federacio⁴⁶.

Kaj fine valoras menci, ke naciaj kaj internaciaj Esperanto-revuoj fojfoje aperigas esperantologiajn kaj interlingvistikajn artikolojn, inter ili aparte *Literatura Foiro*, *Internacia Pedagogia Revuo*, *Fonto*, *La Gazeto*, *Scienca Revuo* kaj *Ilis-Forumo* (1989-1995), plue *Esperanto*, *Esperanto aktuell* kaj *der esperantist* (1965-1990). Foje oni trovas ankaŭ priplanlingvajn kontribuojn en *Progreso* (Ido), *Panorama in Interlingua* (Interlingua IALA-Gode) kaj *Cosmoglotta* (Occidental-Interlingue).

⁴² Pri la enhavo de la unuaj du kajeroj vidu *IntI* 33, *Ipl* 32+37.

⁴³ Pri la enhavo vd. *Ipl* 12-13.

⁴⁴ Vd. la titololistojn en *Ipl* 17.

⁴⁵ Vd. la liston de la titoloj en “Esperanto aktuell” 5/2002, p. 2.

⁴⁶ Vd. la liston de la publikaĵoj en *Ipl* 31 kaj *IntI* 33.

5. BIBLIOGRAFIJ

Rezultodona povas esti la serĉado en apartaj interlingvistikaj superrigardaj bibliografioj. Tamen kelkaj lingvistikaj bibliografioj havas sekciojn ankaŭ pri interlingvistiko.

5.1. Interlingvistikaj superrigardaj bibliografioj

Bibliografioj, verkitaj de interlingvistoj, kovras parton de la baza verkaro. Ĝis la mezo de la 20-aj jaroj la plej gravan literaturon en kaj pri planlingvoj registris la klasika *Bibliografio de Internacia Lingvo* de Petr E. Stojan (1929/73). Hauptenthal (1968), Tonkin (1977), Wood (1982) kaj Tonkin/Fettes (1996) prezentas komentitajn elektojn de pli novaj verkoj.

La ĝis nun plej ampleksan, kronologie ordigitan liston de ĉiuj ĝis 1973 registritaj planlingvaj sistemoj kun mallonga karakterizo, lingvaj ekzemploj kaj bazaj bibliografiaj informoj liveris Duliĉenko (1990). Bibliografion de interlingvistikaj-esperantologiaj bibliografioj (inkluzive de kaŝitaj bibliografioj) prezentis la aŭtoro de ĉi tiu studo, kiu ĝis 1983 registris ankaŭ 2000 titolojn de la plej grava interlingvistika/esperantologia literaturo (vd. Blanke 1985, p. 296-381).

Multaj studoj troviĝas en la ofte malfacile alireblaj planlingvaj revu(et)oj, kiuj ofte havis/havas nur mallongan vivon (averaĝe 4-5 jarojn). Máthé preparis bibliografion de 1880 ĝis meze de la 1990-aj jaroj kun 14 000 *periodaĵoj* en kaj pri planlingvoj (de ili ĉ. 90% lige al Esperanto)⁴⁷.

Ĝi estas rigardebla modernigita daŭrigo de la bibliografio de planlingvaj periodaĵoj de Takács (1934), kiu siatempe registris 1276 titolojn en Esperanto kaj 195 en aliaj planlingvoj.

Jen unua superrigardo por 11 393 titoloj, laŭ Máthé (1993):

<i>Revuoj en/pri la lingvo</i>		<i>kvanto</i>	<i>proporcio %</i>
Esperanto	(1887)	10.440	91,63
Volapük	(1879)	297	2,61
Ido	(1907)	286	2,51
Occidental-Interlingue	(1922)	99	0,87
Interlingua (IALA/Gode)	(1951)	83	0,73
Aliaj planlingvoj		188	1,65

⁴⁷ Vd. Máthé (1993) kaj la proveldonaĵon Rondo Takács (1992). En Budapeŝto 1993-1994 aperis entute 18 kajeroj de la bibliografia bulteno *Periodaĵoj*.

5.2. Specialaj interlingvistikaj bibliografioj

Al tiu ĉi grupo oni povas alkalkuli verkojn por unuopaj planlingvoj. Al ili apartenas kelkaj bibliografioj, kiuj registras multe pli ol Stojan (1929/73), ekz. pri *Volapuko* (Haupenthal 1982), *Ido* (Carlevaro/Haupenthal 1999) kaj *Occidental-Interlingue* (Stenström 1997). La komencojn de la unua planlingva movado, tiu de Volapuko, eblas ankaŭ rekonstrui helpe de represaĵo de la unua granda volapuka revuo⁴⁸.

Ankaŭ gravas la *laŭtemaj bibliografioj kaj listoj de publikaĵoj* de konataj interlingvistoj.

Al la laŭtemaj bibliografioj apartenas la *bibliografio de Esperanto-vortaroj* de Ockey (1982)⁴⁹ kaj la *bibliografio pri terminologio kaj faka apliko de Esperanto* (Blanke 1998a).

En la menciitaj festlibroj (vd. 2) oni trovas la listojn de publikaĵoj de la honorigitaj personoj, ekz. por *André Albault* (en I. Haupenthal/R. Haupenthal 2000), por *Detlev Blanke* (en Fiedler/Liu 2001), por *William Auld* kaj *Marjorie Boulton* (en Benczik 1999), por *Helmar Frank* (en Barandovská-Frank 1993a, 1993b kaj Pinter 1999)⁵⁰, por *Reinhard Haupenthal* (en Menade... 1998)⁵¹, por *Gaston Waringhien* (en Haupenthal 1985), kaj simile.

En *Ipl* kaj *Intl* foje estas publikigataj listoj de publikaĵoj de interlingvistoj, ekz. pri *Aleksandr Duliĉenko* (*Ipl* 39 kaj 42; *Intl* 40), *Sabine Fiedler* (*Ipl* 30, *Intl* 30), *Georg-Friedrich Meier* (*Ipl* 5, *Intl* 5), *Hermann Ölberg* (*Ipl* 42, *Intl* 44), *Alicja Sakaguchi* (*Ipl* 34, *Intl* 35) kaj *Adomas Vaitilavičius* (*Ipl* 20). Ĉi tie menciblas ankaŭ la interlingvistike gravaj publikaĵoj de *Jan Ámos Komenský* (*Ipl* 1+2, *Intl* 2 kaj 3-4) kaj *Wilhelm Ostwald* (*Ipl* 37, *Intl* 46).

Ekzistas nur malmultaj bibliografioj de interlingvistikaj publikaĵoj, aperintaj en unuopaj landoj. Ili ekzistas por *Germana Demokratia Respubliko* (Blanke 1990), *Rumanio* (Dominte/Nagy 2000) kaj *Sovetunio* (Duliĉenko 1983).

⁴⁸ *Rund um die Welt. Zeitschrift für Volapükisten und solche, die es werden wollen.* 1.-4. Vol. (aprilo 1888–marto 1892, represaĵo, eldonita de Reinhard Haupenthal (Hildesheim–Zürich–New York: Georg Olms, 2000).

⁴⁹ Geoffrey Sutton enkomputiligis kaj aktualigis ĝis 2002 la bibliografion de Ockey, kiu ankaŭ enhavas fakvortarojn; vidu uea.org/dokumentoj/bibliografioj.html. Liston de fakvortaroj de 1980 ĝis 2002 kompilis Jérôme Vachey. Ĝi troviĝas en la reto: www.eventoj.hu/steb/vortaroj kaj uea.org/dokumentoj/terminaroj_1980-2002.html (28.5.03).

⁵⁰ La interlingvistike interesaj titoloj estas dissemataj en la listoj de la publikaĵoj de Frank.

⁵¹ Vidu ankaŭ la unuan liston de publikaĵoj de Haupenthal (Esther Haupenthal 1995).

5.3. Interlingvistiko en internaciaj lingvistikaj periodaj bibliografioj

Relative rapida informiĝo pri novaj publikaĵoj eblas per la traserĉo de internaciaj bibliografioj kun interlingvistikaj sekcioj. La plej grandajn mi sube prezentos.

5.3.1. BL-CIP

La *Bibliographie linguistique de l'année... et compléments des années précédentes. Eld. de Comité International Permanent des Linguistes. Dordrecht/Boston/London: Kluwer (BL-CIP)*⁵² aperadas ekde 1939 kaj tutmonde estas la plej granda lingvistika bibliografio.

En la volumo por 1998 (aperinta en 2000) estas utiligitaj ĉ. 2700 periodaĵoj. La bibliografio por la menciita jaro entenas entute 20 743 registrojn. Ekde 1948 ĝi enhavas rubrikojn kun malsamaj nomoj:

Langues auxiliaires – auxiliary languages / Interlinguistique (langues planifiées) – Interlinguistics (planned languages) – kaj ekde 1989 / Interlinguistique – Interlinguistics.

La kvanto de la registritaj titoloj en ĉi tiu rubriko estas tre malgranda kaj neniel reprezenta por la vere grava fakliteraturo. De 1948-1998 ĝi sumiĝas je entute 496 titoloj, do jare averaĝe 9-10 registroj. Planlingva literaturo apenaŭ estas konsiderata.

5.3.2. BLL

La *Bibliography of Linguistic Literature, Frankfurt/M.: Klostermann (BLL)*⁵³ registras la lingvistikan literaturon nur en limigita kadro. Krom pri ĝenerala lingvistiko ĝi sin koncentras al anglistiko, germanistiko kaj romanistiko. Por la jaro 2001 ĝi trarigardis ĉ. 1300 periodaĵojn.

La interlingvistikaj rubrikoj de BLL estas *Plansprachen* (1971-1980) kaj ekde 1981 *Plansprachen / Artificial languages*. La kriterioj por la konsidero de la kontribuoj, simile kiel ĉe BL-CIP, estas neklaraj. Kontribuojn, verkitajn en planlingvoj, oni foje registras. Dum la lasta tempo oni ekatentigas ankaŭ pri “Interlinguistische Informationen” (*IntI*) kaj la aktoj de la GIL-Konferencoj (“Beihefte”). De 1971-2001 estis registritaj entute 353 titoloj kun interlingvistika enhavo, do jare averaĝe 11-12 titoloj.

⁵² *Linguistic bibliography for the year... and supplements for previous years. Published by the Permanent International Committee of Linguists under the auspices of the International Council for Philosophy and Humanistic Studies.* Edited by Mark Janse and Sijmen Tol, with the assistance of Inge Angevaere and Theo Horstman.

⁵³ *Bibliography of General Linguistics and of English, German, and Romance Linguistics.* Compiled by Elke Suchan, Heike Westermann and Marc-Oliver Vorköper.

5.3.3. MLA

La *International Bibliography of Books and Articles on the Modern Languages and Literatures*. New York, eldonita de *Modern Language Association of America*: MLA laŭ kvanto kaj multflankeco de la bibliografiado de la lingvistika fakliteraturo sekvas nur je la dua loko post BL-CIP. Por interlingvistikaj esploroj ĝi tamen estas pli signifa.

Por la jaro 2001 MLA konsideris entute 4500 periodaĵojn (plus artikoloj en diversaj aliaj revuoj, i.a. pro la interlingvistikaj materialoj). Sed inter ili troviĝas ankaŭ revuoj pri literaturo, folkloro kaj teorio de la fremdlingvo-instruado. Pro tio komparo kun BL-CIP kaj BLL rilate al la uzataj periodaĵoj nur malfacile eblas. Por 2001 MLA registris entute 10 800 lingvistikajn titolojn. Antaŭ 1931 (kiel *Publications of The Modern Language Association of America*) la bibliografio registris nur usonajn publikaĵojn, sed post 1931 ĝi konsideris ankaŭ la fakliteraturon de aliaj landoj.

Interlingvistikaj rubrikoj aperadis nur ekde 1960:

1960-1967: *International languages* (sub *General language and linguistics*)

1968-1973: *Interlinguistics* (sub *Composite and derivative languages, other communicative behavior*)

1974-1980: *International languages*

1981-1982: *International languages. Auxiliary languages*

ekde 1983: *Auxiliary languages. International languages*⁵⁴

Dum la periodo de 1931-2001 MLA registris entute 6514 interlingvistikajn titolojn. De 1971-1990 temis pri 3164 titoloj, do jare averaĝe 158 titoloj.

La averaĝa kvanto de jare registritaj titoloj post 1990 kreskis kaj estas ĉe ĉ. 300. Ĉi tiuj nombroj tamen estas nur minimumaj indikoj por la registrita kompleta materialo. Aldoniĝas vico da interlingvistike signifaj registroj sub la rubriko *Invented languages*. Krome en la sekcioj pri literaturteorio, folkloro kaj ekde 2000 instruado de fremdaj lingvoj, same troviĝantaj en la MLA-bibliografio, estas registritaj pliaj kontribuoj, ekz. pri naciaj literaturoj, tradukado el etno-lingvoj en Esperanton, pri la metodiko de la instruado de Esperanto kaj literaturkritiko (parte pri unuopaj aŭtoroj, kiuj verkas en Esperanto) k.s. Pro tio jare aldoniĝas minimume 50 pliaj registroj.

⁵⁴ La kunlaborantoj de la interlingvistikaj rubrikoj estis W. A. Verloren van Themaat (1979-1989), Humphrey Tonkin (1980- , nun ĉefbibliografo), Jane Edwards (1984-1998) kaj Detlev Blanke (1992-).

La MLA-bibliografio jare aperas en du volumoj, laŭ la usona formato pli granda ol A4, kun po 1400-1600 paĝoj:

a) Subject Index, b) Classified Listings. Author Index.

Volumo a) registras la materialon laŭ temoj kaj (ĉe literaturteoriaj kontribuoj) laŭ aŭtoroj (ekz. artikoloj pri la verko de William Auld aŭ pri Esperanto-tradukoj de verkoj de Shakespeare). Sekvas referencoj al volumo b).

La interlingvistika sekcio en volumo b) ebligas orientiĝon ĝenerale kaj pri unuopaj lingvaj sistemoj.

Pri Esperanto oni ekz. trovas la rubrikojn *bibliografio*, *gramatiko*, *leksikologio* (kun subrubrikoj laŭ vortspecoj), krome pri *etimologio*, *leksikografio*, *frazologio*, *terminologio*, *vortpruntado*, *morfologio* (inkluzive de *vortfarado*, *onomastiko* (*antroponimoj*, *hidronimoj*, *toponimoj*...), *fonetiko*, *fonologio*, *pragmatiko*, *semantiko*, *stilstiko*, *sintakso* (ekz. *aspektoj*, *kazoj*, *predikatoj*, *sekvo de frazpartoj*), *tradukscienco* (inkl. *maŝina traduko*), *skribsistemoj* (*alfabeto*, *ortografio*).

La registrita materialo de la MLA-Bibliografio ankaŭ estas ricevebla elektronike kaj registras tiuforme la materialojn ekde 1963. Oni povas serĉi diversvoje, ankaŭ en la reto kaj sur kompaktdisko.

5.3.4. LLBA

La resumo-servo *Linguistics and Language Behavior Abstracts* (*incorporating Reading Abstracts*). *San Diego: Sociological Abstracts Inc. (LLBA)* aperadas ekde 1965 kaj sin difinas jene: “*collection of nonevaluative abstracts which reflects the world’s literature in language behavior, linguistics, and related disciplines and a comprehensive book review bibliography*” (LLBA 29(1995) 1, p. 19). La serio jare aperas per 5 eldonoj (la volumo kun ĉ. 400-500 p.). La unuopaj volumoj entenas koncizajn resumojn de artikoloj aparte de lingvistikaj revuoj kaj monografioj.

La sekcio 18 *International Languages* estas rubriko de *Descriptive Linguistics*. En la jaro 1998 tie troviĝis 73 kaj en 1999 44 resumoj, inter ili ankaŭ multaj kontribuoj, kiuj ne nepre kalkuleblas al interlingvistiko. Ekde 1998 oni resumas ankaŭ esperantajn kontribuojn.

5.3.5. Komparo inter BL-CIP, BLL kaj MLA

La sekva tabelo donas superrigardon pri la kvanto de interlingvistikaj registroj en BL-CIP, BLL kaj MLA (ĉi tie nur la rubriko *Auxiliary Languages. International Languages*):

	1993	1994	1995	1996	1997	1998	1999	2000	2001
BL-CIP	11	10	13	24	20	12	* ⁵⁵	*	*
BLL	7	10	11	20	25	5	15	17	8
MLA	397	285	392	329	251	327	209	289	311

Analizo de la registroj laŭ la lingvoj por la respektive tri lastaj jaroj donas jenan bildon:

BL-CIP (1996-1998), 56 registroj

<i>lingvoj</i>	<i>absoluta kvanto</i>	<i>%</i>
germana	22	39,28
angla	17	30,36
aliaj 8 etno-lingvoj	15	26,79
planlingvoj	2	3,57

BLL (1999-2001), 40 registroj:

<i>lingvoj</i>	<i>absoluta kvanto</i>	<i>%</i>
germana	18	45
angla	8	20
aliaj 4 etno-lingvoj	6	15
planlingvoj	8	20

MLA (1999-2001), 822 registroj

<i>lingvoj</i>	<i>absoluta kvanto</i>	<i>%</i>
germana	115	13,99
angla	53	6,45
itala	13	1,58
nederlanda	13	1,58
hungara	9	1,09
franca	5	0,60
aliaj 17 etno-lingvoj	23	2,80
Esperanto	565	68,73
aliaj planlingvoj	26	3,16

La analizo de la MLA-registroj i.a. montras:

71,9 % de la registrita literaturo estas verkita en planlingvoj. Se oni prenas tiun nombron = 100 %, tiam Esperanto kovras 95,6 % de la planlingva literaturo.

⁵⁵ Pro la malrapida aperitimo la lasta volumo (2002) koncernas la materialon de 1998.

De la 28,1 % de la etno-lingva literaturo la plej granda parto estas germanlingva. Se oni analizas pli grandan kvanton da registroj, la bildo certe iom ŝanĝiĝos, sed eble ne tre grave. Sed jam tiuj ciferoj parolas por si mem. Oni ne estas sufiĉe informita se oni legas nur anglalingvan literaturon. Kompreneble tiuj kvantaj indikoj neniel povas ion diri pri la kvalito de la publikaĵoj.

5.4. Naciaj periodaj lingvistikaj bibliografoj

Foje oni trovas interlingvistikajn rubrikojn en *naciaj* lingvistikaj bibliografoj. Ekzemplo por tio estas la jara publikaĵo *Sprachwissenschaftliche Informationen* (lingvistikaj informoj) de la Centra Instituto por Lingvistiko ĉe la Akademio de Sciencoj de Germana Demokratia Respubliko. De 1985-1991 ĝi havis rubrikon *Plansprachen* (planlingvoj)⁵⁶.

5.5. Bibliografoj de unuopaj lingvistikaj kampoj

Bibliografoj pri unuopaj lingvistikaj kampoj ĝenerale ne entenas interlingvistikajn sekciojn.

Escepto estas *Kommentierte Bibliographie zur Slavischen Soziolinguistik* (Brang/Züllig 1981: 1143-1157), kiu entenas 192 parte komentitajn registrojn.

5.6. Bibliografie orientitaj interlingvistikaj bultenoj

Interlingvistikaj bultenoj relative rapide kaj precize informas pri novaj publikaĵoj kaj aliaj aktivaĵoj.

Apartan mencion meritas la bulteno *Fokuso*, kiun de 1967-1976 redaktis Ebbe Vilborg en Esperanto. Sume ĝi enhavas 1303 bibliografiajn unuojn en la rubrikoj *ĝenerala kaj kompara interlingvistiko, Esperanto, Ido, Interlingua, Interlingue, aliaj projektoj*.

La *Centro por Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo CED*, (angle *Center for Research and Documentation on World Language Problems*), Rotterdam/Hartford, kuneldonanto de *Language Problems & Language Planning*, ekde 1974 (kun interrompoj) publikigas en Esperanto la interlingvistikan bultenon *Informilo por Interlingvistoj, IpI*⁵⁷.

La bulteno informas relative amplekse pri interlingvistikaj kaj esperantologiaj novaj eldonaĵoj. Ĝis fino de 2002 aperis 67 numeroj (ĉiuj tri serioj kune).

⁵⁶ Vd. Jüttner (1990). Kunlaboris la aŭtoro de ĉi tiu studo.

⁵⁷ De 1974–1977 redaktita de Ulrich Lins, Kolonjo (unua serio: 1-4), 1983-1990 de Ryszard Rokicki, Varsovio (dua serio: 1-20) kaj ekde 1992 de Detlev Blanke, Berlin (tria serio: 1-43[4/2002], daŭrigata).

Komparebla al *Ipl* estas la germanlingva bulteno *Interlinguistische Informationen, IntI*. Ĝin ekde 1992 eldonas la societo *Gesellschaft für Interlinguistik e.V., GIL* (Societo pri Interlingvistiko), kiu aktivis en Germanio. Redaktas ĝin la aŭtoro de ĉi tiu studo. Ĝis fino de 2002 aperis 45 numeroj.

Kaj *Ipl* kaj *IntI* klopodas kiom eble plej amplekse sekvi la sciencajn eldonaĵojn kaj aliajn aktivecojn pri planlingvoj, do ne limigas sin al Esperanto kaj inkludas ankaŭ lingvopolitikajn kaj aliajn aspektojn de la internacia lingva komunikado (aparte la lingvopolitikon de Eŭropa Unio). Tamen, la enhavo kompreneble dependas de tiuj materialoj, pri kiuj la redaktoro ricevas informojn.

Por ĉiuj kajeroj de *Ipl* kaj *IntI* de la lasta jardeko (1992-2002) ekzistas personindeksoj (*Ipl*: n-roj 40-41, *IntI*: n-roj 42-43), kiujn kompilis Ino Kolbe.

Flandra Esperanto-Ligo de 1991-1996 eldonis en Esperanto la bultenon *Terminoteko* (Redaktoro: Bernhard Pabst). Ĝi unuavice registris publicaĵojn kaj eldonaĵojn en kaj pri la esperanta faklingvo, aparte en la kampo de terminologioj. Entute aperis 14 numeroj.

En Usono de 1975-1985 aperis 9 eldonoj de la novaĵletero *Esperanto Studies*, eldonita de *Esperanto Studies Association of America*. Ekde 1991, kvazaŭ kiel daŭriganto, *Esperantic Studies Foundation* aperigas bultenon kun la titolo *Esperantic Studies* (ĝis 1999 aperis 12 eldonoj). Ekde n-ro 13 (2002) la serio aperas kiel elektronika eldono (www.esperantic.org/esf/es13/toc.htm 20.4.03).

Fine ni menciuj, ke la ĉina interlingvisto LIU Haitao⁵⁸ reflektis parton de la menciitaj materialoj en 10 eldonoj de sia ĉinlingva bulteno *Interlingvistika Kuriero*.

5.7. Bibliografiaj helpiloj por traserĉo de revuoj

Estas aparte malfacile trovi gravajn artikolojn en revuoj. Tio koncernas kaj la neplanlingvajn lingvistikajn kaj la planlingvajn revuojn. Tamen ekzistas kelkaj utilaj helpiloj.

5.7.1. Lingvistikaj revuoj

Ofte nur hazarde oni ekscias pri interlingvistikaj studoj, verkitaj de ne-interlingvistoj kaj aperantaj en lingvistikaj revuoj. Oni ja ĝenerale ne kapablas traserĉi laŭ interlingvistike signifaj materialoj iom grandan kvanton da *lingvistikaj revuoj*, troviĝantaj en universitataj bibliotekoj aŭ aliloke.

⁵⁸ Pri LIU vd. la intervjuon en la revuo “Esperanto” (Rotterdam) 12/2002 kaj *Ipl* 42.

Certan helpon donas la *internaciaj bibliografioj pri studoj en sciencaj revuoj*, kie laŭ indekso oni povas trovi malmulte konatajn materialojn. Tio ankaŭ validas por recenzoj. Tia bibliografion fondis la germano Felix Dietrich.⁵⁹

Ekde 1972 la traserĉo ankaŭ povas okazi desur la propra skribotablo. La urba kaj universitata biblioteko de Frankfurt/Main (DFG-Sondersammelgebiet Linguistik⁶⁰) eldonadas *Current Contents Linguistik* (tiel!): *Inhaltsverzeichnisse linguistischer Fachzeitschriften. Tables of Contents of Linguistic Journals* (CCL). Jare aperas 4 kajeroj (kun po ĉ. 300-400 p.). CCL reproduktas la enhavo-tabelojn de ĉ. 250⁶¹ lingvistikaj revuoj, i.a. de “Language Problems & Language Planning (LPLP)” kaj “Interlinguistische Informationen, (IntI)”.

Oni tamen konsideras revuojn nur en lingvoj kun la latina kaj cirila alfabetoj.

5.7.2. Esperanto-revuoj

Multaj malgrandaj studaĵoj, diskutkontribuoj aŭ aliaj esprimiĝoj pri specialaj problemoj de esperantologio, estas dissemataj en diversaj *Esperanto-revuoj* (vd. ankaŭ 4.2). Ekzistas la danĝero, ke ili restas forgesitaj. Jaraj registroj aŭ jaraj enhavtabeloj por kelkaj revuoj donas certan helpon de orientiĝo, aparte se temas pri esploroj pri la esperanta lingvo-komunumo, ekz. la jarindekso de la revuo *Esperanto* (Rotterdam: UEA).

Tamen ĝis nun nur por malmultaj revuoj ekzistas elektaj bibliografioj kaj registroj, nemalhaveblaj por la konatiĝo kun la enhavo. Tiaj ekzistas i.a. por *Literatura Mondo* (M. Benczik 1976), *la nica kultura revuo* (Vatré 1988), *Scienca Revuo* (Bednarz 1984), *der esperantist* (Knöschke/Kolbe 1997; Kolbe 1998)⁶² kaj *Paco*⁶³. Scienchistorie valoras ankaŭ represo de Esperanto-gazetoj. Ekz. aperis represo de la unua revuo en Esperanto, *La Esperantisto 1889-1895*.⁶⁴

⁵⁹ Internationale Bibliographie der Zeitschriftenliteratur/begründet von Felix Dietrich. Osnabrück 1897-1964. Ekde 1965 la bibliografio aperadas en Osnabrück, kun 3 sekcioj:

A: Bibliographie der deutschen Zeitschriftenliteratur.

B: Bibliographie der fremdsprachigen Zeitschriftenliteratur. Répertoire bibliographique international des revues. International index to periodicals.

C: Bibliographie der Rezensionen und Referate.

⁶⁰ DFG = Deutsche Forschungsgemeinschaft/Germana Asocio pri Esplorado, speciala kolektado-kampo lingvistiko.

⁶¹ La eldono de CCL 30(2002), Nr. 1-2 listigas 260 titolojn.

⁶² Ankaŭ vd. la elektan bibliografion en “der esperantist” 26 (1990), Nr. 5(163), p. 97-109.

⁶³ Nur la eldonoj de GDR (Berlin) 1966-1989, pri tio vidu la elektan bibliografion en “der esperantist” 26 (1990), Nr. 4 (162), p. 90-93.

⁶⁴ La Esperantisto. Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto. 1889-1895. Kun postparolo de Reinhard Haupenthal. Hildesheim-Zürich-New York: Olms 1988.

De granda valoro estas la bibliografio de *Esperanto-Gazetartikoloj*, kompilata de Bernhard Pabst. Ĝis la fino de januaro 2003 la bibliografio, kiu ekzistas nur kiel elektronika datenbanko, enhavis ĉ. 6500 registrojn, parte komentitajn. Ĝi estas alirebla per la retpaĝo de la Societo pri Interlingvistiko (vd. 6). Ĉi tiu bibliografio estas daŭre kompletigata.

5.8. Planlingvaj libro-katalogoj

Katalogoj kun ofertoj de planlingva literaturo aktuale estas eldonataj en certa ritmo nur de *Universala Esperanto-Asocio* (UEA, Rotterdam) kaj de *Union Mundial pro Interlingua* (UMI, Beekbergen/Nederlandoj).

La librokatalogo de UEA por 2001⁶⁵ entenas pli ol 3500 titolojn.

Ĝi entenas i.a. lernolibrojn kaj vortarojn en 47 lingvoj. En la rubrikaj *Lingvo*, *Esperantologio*, *Interlingvistiko*, *Lingvaj Problemoj* kaj *Movado kaj Historio* oni ofertas ĉirkaŭ 500 titolojn. En la rubriko Bibliografioj estas registritaj 49 titoloj.

Ĉiujare en Esperanto aperas ĉ. 200-250 novaj titoloj en malsamaj ĝenroj. Pri tiuj novaj eldonaĵoj unuavice informas la revuo *Esperanto* en sia rubriko *Laste aperis...*

La libro-katalogo por *Interlingua* de la jaro 2000⁶⁶ entenas ĉ. 250 titolojn. Unuavice temas pri lerniloj en 22 lingvoj. Kiel montras analizo de la ĉiujare aperantaj novaj eldonoj de la katalogo, jare aldoniĝas ĉ. 5-10 novaj titoloj.

Maloftas interlingvistikaj materialoj.

Foje ankaŭ utilas traserĉi la servojn de interretigitaj *librobrokantejoj*, kiel montris Lins (2002)⁶⁷.

6. PLANLINGVAJ BIBLIOTEKOJ KAJ ARKIVOJ

De granda signifo por la serĉo kaj havigo de la interlingvistika faka literaturo estas la *publikaj kaj privataj bibliotekoj kaj arkivoj*, disponantaj pri planlingvaj materialoj. Marinko Gjivoje (1980) priskribis 30 el la plej gravaj.

Laŭ superrigardo, prezentita de Árpád Máthé 1992 en Vieno⁶⁸, en la mondo

⁶⁵ Vd. Libroservo de UEA, 2001. *Esperanto-Katalogo*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 190 p. La plej aktuala eldono troveblas sub www.uea.org (20.4.03).

⁶⁶ Vd. *Bibliographia de Interlingua. Catalogo de publicationes in e pro Interlingua*. Beekbergen: Servicio de libros U.M.I., edition januaro 2000, (numero 27), 28 S. La lasta eldono troveblas sub www.interlingua.com (20.4.03).

⁶⁷ Serĉo en granda germana reto de librobrokantejoj www.zvab.com rezultigis 300 titolojn (20.4.03).

⁶⁸ En prelego kadre de la 15-a Esperantologia Konferenco, 1992, dum la 72a Universala Kongreso de Esperanto.

tiam ekzistis en 30 landoj pli ol 100 interlingvistikaj bibliotekoj kaj arkivoj. Ili entenas gravajn interlingvistikajn kaj esperantologiajn verkojn, krome planlingvajn periodaĵojn kaj parte ankaŭ valorajn arkivaĵojn.

Apartan problemon prezentas la *arkivaĵoj*. Ilia konservado ofte okazas kun malpli da zorgemo ol tiu de libroj. Ĉe tio oni pretervidas, ke temas pri unikaĵoj, kiuj facile perdiĝas aŭ “estas recikligataj” (ekz. korespondaĵoj kaj nepublikigitaj manuskriptoj de gravaj interlingvistoj kaj esperantologoj). Malsame al tiaj arkivaĵoj perditaj libroj plej ofte estas rehavigeblaj, respektive troviĝas en diversaj bibliotekoj kaj kolektoj.

La plej gravaj kolektoj⁶⁹ estas la *Internacia Esperanto-Muzeo Vieno* (‘Kolekto Planlingvoj’, sekcio de la Aŭstria Nacia Biblioteko)⁷⁰ kaj la *Centre de documentation et d’ étude sur la langue internationale (CDELI)*, parto de la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds (Svisio).⁷¹

Tiuj bibliotekoj entenas materialojn ne nur en kaj pri *Esperanto*, sed ankaŭ pri *Volapuko*, *Latino sine flexione*, *Occidental-Interlingue*, *Ido*, *Novial*, *Interlingua* kaj aliaj planlingvoj. Arkivaĵoj aparte multas ĉe CDELI. Elektronika katalogo preparatas. Laŭ signifo sekvas la *Hodler-biblioteko de Universala Esperanto-Asocio* en Rotterdama⁷², la *Biblioteko de la Germana Esperanto-Instituto* en Aalen⁷³, la *Biblioteko Butler* de la Brita Esperanto-Asocio (ekde 2002 en Barlaston, Staffordshire), la *Hispana Esperanto-Muzeo* en Sant Pau d’Ordal (ĉe Barcelono), la *Kolekto Károly Fajsz* en Budapeŝto (vd. la katalogon de Pataki-Czeller 1991), la *Kolekto Cesar Vanbiervliet* (specialigita pri periodaĵoj, parto de la urba biblioteko Kortrijk/Belgien), la *Franca Esperanto-Muzeo* en Gray kaj la interlingvistika kolekto ĉe la *biblioteko de IULM* (Istituto

⁶⁹ La aktualaj adresoj troviĝas en la “Jarlibro de Universala Esperanto Asocio”, Rotterdama.

⁷⁰ Vd. la bedaŭrinde tre malnoviĝintajn katalogojn de Steiner 1957, 1958, 1969, Hube/März 1975. Pri novaj akiraĵoj de la periodo 1950-1984 informis “Informilo de IEMW”, anstataŭigita de 1985-1989 per “Bibliografio de Esperanto (kaj aliaj planlingvoj)”. En la plej nova tempo la katalogado okazas per la elektronika datenbanko TROVANTO, utiligebla per la reto. La 29-an de novembro 2002 la datenbanko entenis 29 000 registrojn (vd. 7).

⁷¹ Vd. Claude Gacond (2003): *Le Centre de documentation et d’ étude sur la langue internationale de la Bibliothèque de la Ville de La Chaux-de-Fonds. 1954-2003: bientôt un demi-siècle d’ activité. Rapport historique. Manuskripto, 50 p. aperonta. (legebla sub www.esperanto-gacond.ch).*

⁷² Pri tio vidu Lins 1995.

⁷³ La kolekto en Aalen en la jaro 2002 entenis ĉ. 40 000 titolojn, inkl. binitaj gazetkolektoj (laŭ “Esperanto aktuell” 21[2002]4, p.13).

Universitario di Lingue Moderne), iniciatita de la Centro Italiano di Interlinguistica⁷⁴.

Plue meritas mencion la kolektoj de la *Katolika Universitato Lublin/Pollando* (vd. Wojtakowski 1979), de la *Universitata Biblioteko Amsterdam* (vd. Catalogi... I,II), la *Kolekto Alan Connor* (vd. Smith/Haake 1978) kaj la biblioteko de la *Japana Esperanto-Instituto*.

Al la bibliotekoj, specialiĝintaj pri laboristmovadaj materialoj, apartenas la *Fritz-Hüser-Institut für deutsche und internationale Arbeiter-Literatur* (Instituto por germana kaj internacia laborista literaturo) en Dortmund kun konsiderinda kolekto pri la historio de la laborista Esperanto-movado (vd. Lins 1998) kaj *Internationaal Instituut voor Sociale Geschiedenis IISG* en Amsterdam (Internacia instituto por socia historio).

En oficialaj *urbaj, regionaj kaj tutŝtataj arkivoj* ofte troveblas materialoj pri la historio de la Esperanto-komunumo⁷⁵.

7. INTERLINGVISTIKO EN ELEKTRONIKAJ MEDIOJ

La utiligo de *elektronikaj medioj* fariĝas ĉiam pli grava por adekvata informado pri interlingvistikaj kaj esperantologiaj materialoj⁷⁶. Ĉiam pli ofte katalogoj kaj aliaj materialoj estas ofertataj sur *optikaj diskoj aŭ laserdiskoj*⁷⁷. La Interreto liveras rapide aktualigeblajn informojn. Elektronikaj *retpoŝtaj kontaktoj* kun specialistoj kaj *diskutrondoj* helpas ĉe la materialserĉo. Eblas elektronika utiligo de publikaj bibliotekaj katalogoj kaj datenbankoj.

Pligrandiĝanta kvanto da revuoj estas *publikigata en la reto*. Tio koncernas ankaŭ *Esperantologio – Esperanto Studies (EES)*: www.math.uu.se/esperanto (20.4.03).

⁷⁴ La aliro al la kolekto eblas pere de www.iulm.it.

⁷⁵ Ekz. la kompleta *arkivo kaj la biblioteko de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR* (GDREA, 1965-1991) kiel parto de la arkivo de Kulturligo troviĝas en Stiftung Archive der Parteien und Massenorganisationen der DDR beim Bundesarchiv, SAPMO, en Berlin (Fondaĵo arkivoj de la partioj kaj amasorganizaĵoj de GDR en la Federacia Arkivo).

⁷⁶ Pri la eblecoj kaj problemoj de la reto-uzo por interlingvistiko lastatempe atentigis Becker (1997; 2001) kaj Fettes (1997).

⁷⁷ La KD “espeRom”, eldonita de Germana Esperanto-Asocio (Freiburg 1996), ekz. entenas i.a. sciencajn studojn pri planlingvoj, kursojn kaj ampleksajn gramatikojn, vortarojn, specialajn bibliografiojn kaj katalogojn de bibliotekoj, ofertojn de libroservoj. Ĝi ankaŭ prezentas la praktikan aplikon de Esperanto (i.a. organizaĵoj, kongresoj kaj aliaj aranĝoj, revuoj) kaj entenas gvidilon tra la daŭre kreskanta oferto de retaj servoj. La kompaktdisko krome entenas la kompletan esperantigitan Biblion (vd. *IntI* 23, *Ipl* 23).

Maloftaj aŭ apenaŭ alireblaj publikaĵoj pri malpli konataj planlingvaj sistemoj estas skanitaj kaj tiel fariĝas denove alireblaj. Estas prezentataj novaj projektoj de planlingvoj kaj ligo-listoj pri unuopaj projektoj.

Kompreneble ankaŭ kutimaj lingvistikaj *elektronikaj servejoj* povas indiki pri interlingvistika materialo, ekz. la utiligo de la servo ‘Linguistic Abstracts On Line’ per abono de ‘Linguist List Plus’ (www.linguistlistplus.com)⁷⁸.

Sekvaj elektitaj *retpaĝaroj* donas superrigardon pri interlingvistikaj aktivaĵoj kaj havas i.a. bibliografiojn kaj multajn pluorientigajn ligojn.

1. *Center for Research and Documentation on World Language Problems* (Centro pri Dokumentado kaj Informado pri la Monda Lingvo-Problemo, CED): www.esperantico.org (en la angla kaj en Esperanto, 20.4.03).

2. *Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (GIL)*, t.e. [germanalingva] Societo pri Interlingvistiko): www.interlinguistik-gil.de (en la germana kaj angla, 20.4.03)⁷⁹.

3. Pli kaj pli interlingvistoj en siaj *personaj retpaĝaroj* atentigas pri siaj propraj publikaĵoj kaj pri aliaj materialoj kaj havas utilajn ligojn al aliaj paĝaroj, tiel aparte la ĉina informadikisto, komputa lingvisto kaj interlingvisto *LIU Haitao* (htliu.yeah.net 20.4.03), krome la japana lingvisto *TSUGUYA Sasaki* (www.ts-cyberia.net 20.4.03) kaj la sveda lingvisto *Hartmut Traummüller* (www.ling.su.se/staff/hartmut/il.htm 20.4.03).

4. La katalogo de la *Planlingva Sekcio de la Aŭstria Nacia Biblioteko TROVANTO* utiligeblas sub www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm (20.4.03). Fine de 2002 oni finis la retrospektan registradon de ĉiuj monografioj. Ĉi-tie ankaŭ troviĝas ligo al la plej ampleksa gramatiko de Esperanto, troviĝanta en la reto: “Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko” de Bertil Wennergren (www.bertilow.com, 20.4.03).

5. Martin Weichert kreis *Virtualan Esperanto-Bibliotekon* VEB: www.esperanto.net/veb/ (20.4.03).

6. Ankaŭ kreiĝas apartaj fake orientitaj retpaĝaroj, ekzemple pri la didaktiko de la instruado de Esperanto kaj la koncernaj instruiloj: www.edukado.net.

7. *Serĉmaŝinoj*, ekz. www.google.com, ebligas trovon de multaj retpaĝaroj kaj publikaĵoj. Serĉo kun la vorto ‘interlinguistics’ donis ĉe Google (20.4.03) 1270 indikojn, kaj kun ‘esperantology’ 170.

Krom grandegaj avantaĝoj la reto havas ankaŭ la malavantaĝon, ke ĝi ne estas stabila kaj ofte nesufiĉe kontrolata. Retpaĝaroj kun siaj adresoj kaj ligoj al aliaj paĝaroj povas ŝanĝiĝi kaj estas forviŝeblaj. Al ĉiu uzanto eblas meti en

⁷⁸ Mi dankas Marc van Oostendorp pro la informo.

⁷⁹ Tie vidu la eseon de Ulrich Becker (2001) pri interlingvistiko en la reto, ankaŭ publikigita en *Intl* 44.

la reton nefiltrite tekstojn kaj aliajn datenarojn kun ofte dubinda kvalito. Pro tio informoj, ricevataj per serĉmaŝinoj, ne ĉiam estas fidindaj kaj postulas kritikan ekzamenon per ekspertoj.

Problemoj pri la respekto de kopirajto kaj de aliaj aŭtoraj rajtoj en la reto ankoraŭ ne estas finsolvitaj.

8. REGISTRO DE INTERLINGVISTOJ KAJ ESPERANTOLOGOJ

Interlingvistoj kaj esperantologoj nur malofte estas registritaj en *Who's Who-Manlibroj* (Kiu-estas-Kiu-libroj). Ekzistas esceptoj.

Ekz. pri germanaj lingvistoj informas Kürschner (1994) en sia *Manlibro de Lingvistoj*. Inter la ĉefaj laborkampoj li mencias *interlingvistikon* (*planlingvo-esploradon*) kaj sub lingvoj *Esperanton* kaj referencas al la koncernaj lingvistoj (kun biografiaj kaj bibliografiaj informoj).

La 18-a eldono de *Kürschner's Deutscher Gelehrten-Kalender* (Walter de Gruyter & Co., Berlin, 1996) entenas informojn pri interlingvistoj kaj prezentas iliajn detalajn bibliografiojn sur kompaktdisko. La 19-a eldono de la sama verko el la jaro 2001 (München: K.G. Sauer) en tri volumoj enhavas registron de kelkaj interlingvistoj kun etaj bibliografioj.

Tre utila estas la *Who's Who de Esperanto*, t.e. *Kiu estas Kiu en scienco kaj tekniko* de Darbellay (1981), kiu siatempe listigas 200 esperanto-sciajn sciencistojn de diversaj disciplinoj el la tuta mondo kun siaj plej gravaj publikaĵoj, inter ili ankaŭ interlingvistoj kaj esperantologoj. Aktualigita kaj grave pli-ampleksigita nova eldono estus dezirinda. Ĝi estus laŭ mi relative facile farebla per la reto.

Iom alian karakteron prezentas la kolekto de sciencistoj kun scipovo de Esperanto en la *Internacia Sciencista Dokumentaro* (T. Frank 1996), kiu estas daŭre aktualigata en la reto: www.ais-sanmarino.org (20.4.03).

LITERATURO

Mallongigoj

GIL *Gesellschaft für Interlinguistik e.V.*

IntI *Interlinguistische Informationen* (Berlin: eldonata de Gesellschaft für Interlinguistik e.V.)

IpI *Informilo por Interlingvistoj* (Rotterdam: eldonata de CED/UEA)

LPLP *Language Problems & Language Planning* (Amsterdam: eldonata de CED/Benjamins)

Se post titolo en krampoj sekvas *IpI* kaj/aŭ *IntI*, tio signifas, ke la enhavo de la verko estas detale prezentita aŭ la enhavtabelo reproduktita en la bulteno(j).

Albani, Paolo/Buonarroti, Berlinghiero (1994): *Aga magéra difúra. Dizionario delle lingue immaginarie*. Torino: Zanichelli, 478 p. (*IpI* 21, *IntI* 23).

Atanasov, Atanas D. (1983): *La lingva esenco de Esperanto*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 175 p.

Bak, Giŭan (1991): *Hanguŭwa esuxpheranthouxi hyŭngthae taejo yŭngu. A Study of Morphological Contrast of the Korean and Esperanto. Studo pri Morfologia Kontrasto de la Korea kaj Esperanto* [Seoul: Konkuk University], Seoul: Seula Esperanto-Kulturcentro, 183 p.

Barandovská-Frank, Věra (1993a): *Kybernetische Pädagogik. Klerigkibernetiko. Schriften 1973-1992 von Helmar Frank und Mitarbeitern*. Band 6, Berlin-Paderborn: Institut für Kybernetik (Bratislava: Esprima, San Marino: AIEP), 1123 p. (Listo de la publikaĵoj de Helmar Frank: p. 1057-1066).

Barandovská-Frank, Věra (1993b): *Kybernetische Pädagogik. Klerigkibernetiko. Schriften 1962-1992 von Helmar Frank und Mitautoren*. Band 7, Berlin-Paderborn: Institut für Kybernetik (Dobřichovice/Prag: KAVA-PECH, San Marino: AIEP), 1088 p. (Listo de la publikaĵoj de Helmar Frank: p. 1018-1019).

Barandovská-Frank, Věra (1995): *Enkonduka lernolibro de interlingvistiko*. Sibiu: Editura Universității din Sibiu, 106 p. [*IpI* 12-13, *IntI* 15-16; ekzistas ĉeĥa eldono: *Úvod do interlingvistiky*, Nitra: SAIS, 1995, 126 p.].

Bausani, Alessandro (1970): *Geheim- und Universalsprachen. Entwicklung und Typologie*. (Trad. Gustav Glaesser). Stuttgart: Kohlhammer, 175 p. [La itala originalo aperis post la germana traduko: *Le lingue inventate. Linguaggi artificiali, linguaggi segreti, linguaggi universali*. Roma: Casa Ed. Astrolabio-Ubaldini Editore, 1974, 2-a eldono 1997].

Becker, Ulrich (1996, Red.): *Translation in Plansprachen. Beiträge gehalten auf der 5. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik, November 1995, in Berlin*. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik, 72 p.

- Becker, Ulrich (1997a, Red.): *Terminologiewissenschaftliche Aspekte der Interlinguistik*. Beiträge gehalten auf der 6. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 15.-17. November 1996 in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 2. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 51 p.
- Becker, Ulrich (1997b): “Interlinguistik im Internet”. En: Becker 1997a, p. 44-46.
- Becker, Ulrich (2001): “Interlinguistik und Internet”. En: Fiedler/Liu 2001, p. 254-277.
- Bednarz, Irena (1984): *Bibliografio de la enhavo de Scienco Revuo 1949-1978. Suplemento 1979-1982*. Varsovio: Pola Esperanto-Asocio, 78+6 p.
- Benczik, Maria (1976): “Literatura Mondo 1922-1949. Kompleta indekso”. 92 p. (aldonaĵo al la represo de Literatura Mondo, vol. 6, 1947-49, Tokio: Kooperativo por Represo de Literatura Mondo ĉe Teikyo Universitato. Anatomia Instituto de Medicina Fakultato).
- Benczik, Vilmos (1999, Red.): *Lingva Arto. Jubilea libro omaĝe al William Auld kaj Marjorie Boulton*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 217 p. [*IpI* 35, *IntI* 37].
- Blanke, Detlev (1981): *Plansprache und Nationalsprache. Einige Probleme der Wortbildung des Esperanto und des Deutschen in konfrontativer Darstellung*. Linguistische Studien 85, Akademie der Wiss. der DDR (Zentralinstitut für Sprachwiss.) Berlin, 162 p.
- Blanke, Detlev (1985): *Internationale Plansprachen. Eine Einführung*. Berlin: Akademie-Verlag, 408 p.
- Blanke, Detlev (1986, Red.): *Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado*. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 228 p. [Unua eldono: 1978].
- Blanke, Detlev (1990): “Interlinguistik in der DDR. Eine Bilanz”. En: *der esperantist* 26, Nr. 5(163), p. 110-117.
- Blanke, Detlev (1995): “Esperanto kaj lingvistiko – sciencpolitikaj aspektoj”. En: *Esperanto-Dokumente* 2, Osnabrück: Deutsches Esperanto-Institut, p. 3-21.
- Blanke, Detlev (1997): “The Term Planned Language”. En: Tonkin 1997, p. 1-20.
- Blanke, Detlev (1998a): “Esperanto kiel faklingvo: Terminologiaj kaj fakaplikaj aktivecoj”. En: *IpI* 7 (1998)24 (1/98), p. 9-18.
- Blanke, Detlev (1998b): “Terminology Science and Planned Languages”. En: Oeser, Erhard/Galinski, Christian (eds.): *Eugen Wüster (1898-1977). Leben und Werk – Ein österreichischer Pionier der Informationsgesellschaft. His Life and Work – An Austrian Pioneer of the Information Society*. Wien: TermNet, p. 133-168 (Pri la verko de Wüster krome vidu *IntI* 28, *IpI* 26.).

- Blanke, Detlev (1998c): “Interlinguistik und Plansprachen”. En: *Sitzungsberichte der Leibniz-Sozietät*, Bd. 21, Heft 2, p. 45-76.
- Blanke, Detlev (2000): “Einige methodologische Probleme der Geschichtsschreibung über GDREA”. En: *Esperanto und Historiographie. Esperanto-Dokumente 4*, Berlin: Deutsches Esperanto-Institut, p. 31–62 (Bibliografio pri la historiografio de la lingvo-komunumo de Esperanto: p. 55–59 kaj *IntI* 41, *IpI* 37).
- Blanke, Detlev (2001a): “Vom Entwurf zur Sprache”. En: Schubert 2001, p. 37-89.
- Blanke, Detlev (2001b, Red.): *Esperanto kaj kulturo – sociaj kaj lingvaj aspektoj: Aktoj de la 19-a Esperantologia Konferenco en la 81-a Universala Kongreso de Esperanto, Prago 1996*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 50 p.
- Bormann, Werner (1995): *Die Hamburger Interlinguistik-Vorlesung*. Kiel: Strigo, 127 p.
- Borsboom, Ed. (1976): *Vivo de Lanti*. Paris: SAT, 273 p.
- Brang, Peter/Züllig, Monika (1981): *Kommentierte Bibliographie zur Slavischen Soziolinguistik*. Band II. Bern: Peter Lang, (interlingvistikaj titoloj: p. 1142-1157).
- Bußmann, Hadumod (2002): *Lexikon der Sprachwissenschaft*. Tria aktualigita eldono. Stuttgart: Kröner, 783 p.
- Carlevaro, Tazio (1998, Red.): *Domaine de la recherche en linguistique appliquée. Deuxième Colloque d'interlinguistique. Contributions*. CDELI – La Chaux-de-Fonds. Bellinzona: Hans Dubois, 235 p. [*IpI* 25, *IntI* 27].
- Carlevaro, Tazio/Haupenthal, Reinhard (1999): *Bibliografio de Ido*. Bellinzona: Hans Dubois/Saarbrücken: Edition Iltis, 193 p.
- Catalogi Kunsttalen I (1969). *Esperanto. Catalogus van de boekerij de Nederlandse Esperantisten-vereniging “La Estonto estas nia” en van de Esperanto-collectie in de Universiteitsbibliotheek. Eerste Deel*. (Speciale Catalogi, Nieuwe Serie, No. 5), Amsterdam: Universiteitsbibliotheek, 338 p.
- Catalogi Kunsttalen II (1969). *Esperanto. Catalogus van de boekerij de Nederlandse Esperantisten-vereniging “La Estonto estas nia” en van de Esperanto-collectie in de Universiteitsbibliotheek. Tweede Deel. Tijdschriften – en Serietitels*. (Speciale Catalogi, Nieuwe Serie, No. 5), Amsterdam: Universiteitsbibliotheek, 56 p.
- Chrdle, Petr (1995, Red.): *La Stato kaj Estonteco de la Internacia Lingvo Esperanto. Prelegokolekto de la unua simpozio de la Akademio de Esperanto (Praha 1994-07-07-14)*. Dobřichovice (Prago): KAVA-PECH, 190 p. [*IpI* 14-15].
- Corret, Pierre (1908): *Utilité et possibilité de l'adoption d'une langue internationale auxiliaire en médecine*. Paris : Presa Esperantista Societo, 142 p.

- Corsetti, Renato/La Torre, Mauro (1995): “Quale lingua prima? Per un esperimento CEE che utilizzi l’esperanto”. En: *LPLP* 19, Nr. 1, p. 26-46.
- Corsetti, Renato/La Torre, Mauro (2001): “Ĉu klara strukturo estas instrua?”. En: *Planned Languages. From Concept to Reality, Part II* (ed. by Klaus Schubert). *Interface. Journal of Applied Linguistics*, 15.2., p. 179-202 (*Ipl* 43, *Intl* 45).
- Couturat, Louis/Leau, Léopold (1903/2001): *Histoire de la langue universelle (1903). Les nouvelles langues internationales (1907). Mit einem bibliographischen Nachwort (deutsch-französisch) von Reinhard Haupenthal*. Hildesheim-Zürich-New York: Olms. (dua represo de la eldonoj de 1903 1907), 576+110+8 p.
- Darbellay, Christian (1981): *Kiu estas kiu en scienco kaj tekniko*. Neuss: Autor, 275 p.
- Dominte, Constantin/Nagy, Jozefo (2000): “Interlingvistiko kaj esperantologio en Rumanio. Bibliografia skizo”. En: *Ipl* 9, Nr. 33(2/2000), p. 4-19.
- Drezen, Ernest K. (1931/1991): *Historio de la Mondolingvo*. [4. eldono, reviziita kaj komentita de S. Kuznecov], Moskva: Progreso, 452 p.
- Duc Goninaz, Michel (1987, Red.): *Studoj pri la Internacia Lingvo. Études sur la langue internationale. Studies on International Language*, Gent: AIMAV, 155 p.
- Duliĉenko, Aleksandr (1983): *Sovetskaja interlingvistika. Annotirovannaja bibliografija za 1946-1982 gg*. Tartu: Tartuskij gosudarstvennyj universitet, 88 p.
- Duliĉenko, Aleksandr (1990): *Meždunarodnye vspomogatel’nye jazyki*. Tallin: Valgus, 445 p.
- Eco, Umberto (1993): *La ricerca della lingua perfetta nella cultura europea*. Rom-Bari: Laterza, 426 p. [Angla traduko 1995: *The Search for the Perfect Language*, 385 p.; Germana traduko 1994: *Die Suche nach der vollkommenen Sprache*. München: Beck, 388 p.; Esperanta traduko 1996: *La serĉado de la perfekta lingvo*, 317 p.; krome tradukoj en aliaj lingvoj [*Ipl* 6-7, *Intl* 9-11].
- Eichholz, Rüdiger/Eichholz, Vilma S. (1982, Red.): *Esperanto in the Modern World. Studies and Articles on Language Problems, the Right to Communicate, and the International Language*. Bailieboro [Ontario, Canada]: Esperanto Press, 600 p.
- Esperanto-katalogo 2001 = Libroservo de UEA (2001): *Esperanto-katalogo*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 190 p.
- Fantini, Alvino E./Reagan, Timothy G. (1992): *Esperanto and Education: Towards a Research Agenda*. Washington: Esperantic Studies Foundation, 136 p.

- Fauvart-Bastoul, Marcelle L. (1902): *D'une langue auxiliaire internationale au point de vue du droit des gens*. Dijon: Rey, 150 p.
- Fettes, Mark (1997): "Interlinguistics and the Internet". En: *LPLP* 21, Nr. 2, p. 170-176.
- Fettes, Mark/Bolduc, Suzanne (1998): *Al lingva demokratio. Towards Linguistic Democracy. Vers la démocratie linguistique*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 212 p. (*Intl* 27, *Ipl* 25).
- Fiedler, Sabine (1999): *Plansprache und Phraseologie: Empirische Untersuchungen zu reproduziertem Sprachmaterial im Esperanto*. Frankfurt/M.: Peter Lang, 444 p. [*Ipl* 31, *Intl* 33].
- Fiedler, Sabine (2002): *Esperanta frazeologio*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 185 p. (*Ipl* 43, *Intl* 44).
- Fiedler, Sabine/Liu, Haitao (2001): *Interlingvistikaj Studoj. Interlinguistische Studien. Festschrift für Detlev Blanke zum 60. Geburtstag. Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke*. Dobřichovice: KAVA-PECH, 736 p. [kun anglaj resumoj de la 49 kontribuoj en *Intl* 39, Esperanto-resumoj en *Ipl* 39].
- Fodor, István (2000): *A világ nyelvei / foszerk*. Budapest: Akadémiai K., XVI, 1699 p.
- Forster, Peter G. (1982): *The Esperanto Movement*. (Contributions to the Sociology of Languages. 32). The Hague–Paris–New York: Mouton, 413 p.
- Frank, Tilo (1996): *Internacia Sciencista Dokumentaro 1996-1999*. Tria eldono. San Marino: AIS, 202 p.
- Gecső, Tamás/Varga-Haszonits, Zsuzsa (1998, Red.): *Memorlibro. Kolekto de prelegoj dum la solena internacia konferenco organizita okaze de la tridekjariĝo de la universitata fako Esperantologio (Budapeŝto, 17/18-04-1997)*, 508 p. [*Ipl* 27, *Intl* 29].
- Gjivoje, Marinko (1980): *Konsultlibro pri Esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj*. Zagreb: Aŭtoro (enkondukoj en la lingvoj angla, germana, franca, kroata, rusa hungara), 55 p.
- Gledhill, Christopher (2000): *The Grammar of Esperanto. A corpus-based description*. München/New Castle: Lincom Europa, 151 p. [unua eldono 1998] (*Intl* 31, *Ipl* 32).
- Glück, Helmut (2000): *Metzler Lexikon Sprache*. Zweite, überarbeitete und erweiterte Auflage. Stuttgart-Weimar: Metzler, 817 p.
- Golden, Bernard (1993): "De 'The International Language Review' ĝis 'Ecologos' – la historio de interlingvistika periodaĵo". En: *Periodaĵoj. Bibliografia organo de Rondo Takács*. Budapest, N-ro 3 (septembro 1993), p. 2.
- Haarmann, Harald (2001): *Kleines Lexikon der Sprachen. Von Albanisch bis Zulu*. München: C.H. Beck, 455 p. (Esperanto: p. 115-118).

- Hagler, Margret, C. (1970): *The Esperanto-Language as a Literary Medium. A Historical Discussion of Esperanto-Literature 1887-1970 and Stylistic Analysis of translated and Original Esperanto Poetry*. Bloomington: Indiana University, 436 p.
- Haupenthal, Esther (1995): *Bibliografio de la verkaro de Reinhard Haupenthal*. Saarbrücken: Iltis, 51 p.
- Haupenthal, Reinhard (1968): *Enkonduko en la Librosocieton de Esperanto. Bibliografio gvidilo kun komento*. Nürnberg: Pickel, 44 p.
- Haupenthal, Reinhard (1976, Red.): *Plansprachen. Beiträge zur Interlinguistik*. Darmstadt: Wiss. Buchgesellschaft, 365 p.
- Haupenthal, Reinhard (1982): *Volapük-Bibliographie*. Hildesheim–Zürich–New York: Olms, 124 p.
- Haupenthal, Reinhard (1985, Red.): *Li kaj Ni. Festlibro por la 80a naskiĝtago de Gaston Waringhien (1901-29 Julio–1981)*. Antwerpen: TK–La Laguna, 512 p.
- Haupenthal, Irmi/Haupenthal, Reinhard (2000, Red.): *De A al B. Festlibro por André Albault*. Schliengen: Edition Iltis, 281 p.
- Heil, Anett (1999): *Grammatische Reduktion in Franko-Kreolsprachen und Plansprachen*. (Rostocker Romanistische Arbeiten, Band 2). Frankfurt/Main et al.: Peter Lang, 220 p. (*IpI* 32, *IntI* 34).
- Hube, Walter/März, Herbert (1975): *Alfabeta katalogo pri la kolektoj de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien. Parto II (M-Z)*. Wien: Internacia Esperanto-Muzeo en Wien/Österreichische Nationalbibliothek, 378 p.
- Hübler, Axel (1985): *Einander verstehen. Englisch im Kontext internationaler Kommunikation*. Tübingen: Gunter Narr, 263 p.
- Isaev, Magomet I. (1976, Red.): *Problemy interlingvistiki. Tipologija i evoljucija meždunarodnyh iskusstvennyh jazykov*. Moskva: Nauka, 157 p.
- Isaev, Magomet I. (1991, Red.): *Problemy meždunarodnogo vspomogatel' nogo jazyka*. Moskva: Nauka, 260 p. (*IntI* 3-4).
- Jansen, Wim (2003, aperonta): *Elementen uit de Interlinguïstiek*. Amsterdam: Universitato.
- Janton, Pierre (1973): *L'Espéranto. (que sais-je? 1511)*. Paris: Presses universitaires de France, 127 p. (4-a eldono 1994).
- Janton, Pierre (1993a): *Einführung in die Esperantologie*. (El la franca trad. Günther Becker). Hildesheim: Olms, 104 p. (2-a eldono). [Bibliografie aktualigita kaj prilaborita estas la angla eldono, kiu superas la originalon kaj alilingvajn tradukojn = Janton 1993b].
- Janton, Pierre (1993b): *Esperanto. Language, Literature, and Community*. Ed. by Humphrey Tonkin. Translated by Humphrey Tonkin, Jane Edwards, and Karen Johnson-Weiner. Albany: State University of New York Press, 169 p.

- Jüttner, Irmtraud (1990): *Bibliographie zur Sprachwissenschaft der DDR für das Jahr 1989 (mit einem Nachtrag für 1988)*. (Sprachwissenschaftliche Informationen Nr. 14). Berlin: Akademie der Wissenschaften der DDR, Zentralinstitut für Sprachwissenschaft, 323 p.
- Kiselman, Christer/Mattos, Geraldo (2001, Red.): *Lingva Planado kaj Leksikologio*. Kontribuajoj al internacia simpozio, Zagrebo 2001 07 28-30. Language Planning and Lexicology. Proceedings of an international symposium. Chapecó/Brasilia-DF: Fonto, 286 p. [*Ipl* 38, *Intl* 41].
- Knöschke, Linde/Kolbe, Ino (1997): *“der esperantist” 1(1965)-164(1990). Register Teil I*. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 123 p.
- Knowlson, James (1975): *Universal Language Schemes in England and France, 1600-1800*. Toronto:University of Toronto Press, 302 p.
- Kökény, Lajos/Bleier, Vilmos (1933-34/79, Red.): *Enciklopedio de Esperanto*. Budapest: Literatura Mondo, 600 p. (2-a eldono:1979, Budapest: Hungara Esperanto-Asocio).
- Kolbe, Ino (1996): *Zur Geschichte des Deutschen Arbeiter-Esperanto-Bundes in Leipzig (West Sachsen). Teil I und II. Von den Anfängen bis zum Verbot 1933. Teil I: Von den Anfängen bis zum “Völkerspiegel” (1924), 64 + VIII p; Teil II: 1925 bis zum Verbot (1933). Eine kommentierte Dokumentation*. Herausgegeben, kommentiert und bearbeitet von Detlev Blanke. 135+24 p. (*Ipl* 21, *Intl* 23).
- Kolbe, Ino (1998): *“der esperantist” 1 (1965) – 164 (1990). Register Teil II*. Berlin: Arbeitsgruppe Geschichte des Esperanto-Verbandes der DDR, 117 p.
- Košecký, Stanislav (1987, Red.): *Problémy interlingvistiky. Zborník materiálov z interlingvistického seminára (Vysoké Tatry 20.-22. mája 1987)*. Bratislava: Jazykovedný ústav L. Štura SAV /Slovenský esperantský sväz/Český esperantský sväz, 180 p.
- Košecký, Stanislav (1990, Red.): *Problémy interlingvistiky II*. Bratislava: Jazykovedný ústav L. Štura SAV/Slovenský esperantský sväz, 127 p. (*Intl* 3-4).
- Koutny, Ilona /Kovács, Márta (1997, Red.): *Struktura kaj Socilingvistika Esploro de Esperanto. Memore al profesoro István Szerdahelyi*. Budapest: Steleto & ILEI, 161 p. [*Ipl* 21, *Intl* 27].
- Kürschner, Wilfried (1994, Red.): *Linguistenhandbuch. Biographische und bibliographische Daten deutschsprachiger Sprachwissenschaftlerinnen und Sprachwissenschaftler der Gegenwart*. Tübingen: Narr, 2 Vol., 1191 p.
- Kuznecov, Sergej N. (1982a): *Osnovy interlingvistiki*. Moskva: Izd. Univ. Družby narodov, 107 p.
- Kuznecov, Sergej N. (1982b): *Osnovy ponjatija i terminy interlingvistiki*. Moskva: Izd. Univ. Družby narodov, 80 p.

- Kuznecov, Sergej N. (1984): *Napравlenija sovremennoj interlingvistiki*: Moskva: Izd. Univ. Družby narodov, 99 p.
- Kuznecov, Sergej N. (1987): *Teoretiĉeskie osnovy interlingvistiki*. Moskva: Izd. Univ. Družby narodov, 207 p.
- Lapenna, Ivo/Lins, Ulrich/Carlevaro, Tazio (1974, Red.): *Esperanto en perspektivo. Faktoj kaj analizoj pri la internacia lingvo*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 843 p.
- Large, Andrew (1985): *The Artificial Language Movement*. Oxford: Basil Blackwell, 239 p.
- Libert, Alan (2000): *A Priori Artificial Languages*. München: Lincom Europa, 139 p. (*IpI* 43, *IntI* 45).
- Libert, Alan (2003): *Mixed Artificial Languages*. München: Lincom Europa, 106 p. (*IntI* 46, *IpI* 44).
- Lins, Ulrich (1988a): *Die gefährliche Sprache. Die Verfolgung der Esperantisten unter Hitler und Stalin*. Gerlingen: Bleicher, 326 p.
- Lins, Ulrich (1988b): *La danĝera lingvo. Studoj pri la persekutoj kontraŭ Esperanto*. Gerlingen: Bleicher, 546 p. (represo 1990, Moskva: Progreso, kun postparoloj de Sergej Kuznecov kaj Detlev Blanke).
- Lins, Ulrich (1995): “Die Hodler-Bibliothek in Rotterdam”. En: *IntI* 4, 17-18 (5-6/95), p. 8-11.
- Lins, Ulrich (1998) : “Das Esperanto-Archiv im Fritz-Hüser-Institut”. En: *Mitteilungen des Förderkreises Archive und Bibliotheken zur Geschichte der Arbeiterbewegung*, Nr. 13 (März 1998), Berlin, p. 2-4.
- Lins, Ulrich (2002): “Trezoroj en la reto”. En: *Esperanto* 95, 12 (1154), p. 251 [*IpI* 42].
- Lipari, Michela (1999, Red.): *IKU. Internacia Kongresa Universitato. Berlino 31 julio–7 aŭgusto 1999*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 83 p.
- Lipari, Michela (2000, Red.): *IKU. Internacia Kongresa Universitato. Tel Avivo 26 julio–1 aŭgusto 2000*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 94 p.
- Lipari, Michela (2001, Red.): *IKU. Internacia Kongresa Universitato. Zagrebo 21-28 julio 2001*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 96 p.
- Liu, Haitao (2001): “Informadika aspekto de interlingvistiko”. En: Fiedler/Liu 2001, p. 147-171.
- Lloancy, Marie-Thérèse (1985): *Esperanto et jeu de mots dans l'œuvre de Raymond Schwartz (1894-1973)*. Paris: Université René Descartes. U.E.R. de Linguistique Générale et Appliquée, 1200 p.
- Lobin, Günter (2002) : *Ein Sprachmodell für den Fremdsprachenunterricht. Der propädeutische Wert einer Plansprache in der Fremdsprachenpädagogik*. Aachen: Shaker, 237 p.

- Lo Jacomo, François (1981): *Liberté ou autorité dans l'évolution de l'espéranto*. Disertacio. Paris (Sorbonne). Pisa: Aŭtoro, 384 p.
- Maat, Jacob (1999): *Philosophical Languages in the Seventeenth Century: Dalgarno, Wilkins, Leibniz*. Amsterdam: Universiteit, Institute for Logic, Language and Computation, 341 p. [*IntI* 34, *IpI* 32].
- Maitzen, Hans Michael/Mayer, Herbert/Tišljár, Zlatko (1994, Red.): *Aktoj de Internacia Scienca Simpozio "Esperanto 100-jara"*. Universitato de Vieno, 28.-30.10.1987. Wien: Pro Esperanto/Malibor: Interkulturo, 250 p. [*IpI* 10-11, *IntI* 15-16].
- Malovec, Miroslav (1999, Red.): *Modernaj rimedoj de komunikado*. (Aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko, 1). Dobřichovice : KAVA-PECH, 193 p. [*IntI* 36].
- Manders, W.[ilhelmus] J.[ohannes] A.[rnoldus] (1947): *Vijf kunsttalen. Vergelijkend onderzoek naar de waarde van het Volapük, Esperanto, Ido, Occidental en Novial*. Purmerend: Muusses, 386 p.
- Manders, W.[ilhelmus] J.[ohannes] A.[rnoldus] (1950): *Interlingvistiko kaj esperantologio*. Purmerend: Muusses, 77 p. (parto [p. 12-19] en germana traduko en Hauptenthal 1976, p. 234-242; represo 1980, Saarbrücken: Iltis).
- Máthé, Árpád (1993): Bibliografio de planlingvaj periodaĵoj. En: *Periodaĵoj. Bibliografia organo de Rondo Takács*. Budapeŝt. N-ro 1 (julio 1993), p. 2.
- Mattos, Geraldo (1987, Red.): *Centjara Esperanto*. Chapéco: Fonto, 240 p.
- Mattusch, Max Hans-Jürgen (1999): *Vielsprachigkeit: Fluch oder Segen für die Menschheit? Zu Fragen einer europäischen und globalen Fremdsprachenpolitik*. Frankfurt/Main: Peter Lang, 321 p. [*IpI* 28, *IntI* 30].
- McCoy, Roy (2002, Red.): *IKU. Internacia Kongresa Universitato. Fortalezo, Brazilo, 3-10 aŭgusto 2002*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 123 p.
- Mel'nikov, Alexandr S. (1990): Principy postroenija i funkcional'nogo razvitija planogo meždunarodonogo jazyka v sovremennoj interlingvistika. Disertacio. Tarty/Minsk, 196 p.
- Menade... (1998) = *Menade bal, püki bal. Festschrift zum 50. Geburtstag von Reinhard Hauptenthal*. Saarbrücken: Edition Iltis, 1998, 487 p.
- Minnaja, Carlo (2001, Red.): *Eseoj memore al Ivo Lapenna*. Kopenhago: T. Kehlet, 417 p.
- Monnerot-Dumaine, M.[arcel] (1969): *Précis d'interlinguistique générale et spéciale*. Paris: Librairie Maloine, 210 p.
- Neergaard, Paul (1942/1979): La esperantologio kaj ties disciplinoj. Taskoj kaj rezultoj. En: *Tra densa mallumo*, Kopenhago, p. 37-64 (Represo: Saarbrücken, Sarlanda Esperanto-Ligo 1979).
- Noltenius, Rainer (1993, Red.): *Den Arbeitern aller Länder eine Sprache! Illustrierte Geschichte der Arbeiter-Esperanto-Bewegung. Al la laboristoj*

- en ĉiuj landoj unu lingvon! Ilustrita historio de la Laborista Esperanto-Movado.* Informationen 37/93. Katalog zur Ausstellung des Fritz-Hüser-Instituts Dortmund. Dortmund: Fritz-Hüser-Institut für deutsche und ausländische Arbeiter-Literatur, 113 p. (Germana, Esperanta) (*IntI* 6, *IpI* 6-7).
- Nuessel, Frank (2000): *The Esperanto Language*. New York, Ottawa, Toronto: Legas, 153 p. [*IpI* 35, *IntI* 36].
- Ockey, Edward (1982): *A Bibliography of Esperanto Dictionaries. Bibliografio de Vortaroj*. Banstead: La aŭtoro, 238 p.
- Papaloizos, Lilli (1992): *Ethnographie de la communication dans un milieu social exolingue. Le Centre Culturel Espérantiste de La Chaux-de-Fonds (Suisse)*. Bern et al.: Peter Lang, 254 p.
- Pataki-Czeller, Mária (1991): *Katalogo de la Esperanto-Kolektaĵo de Károly Fajszki Budapest. Libroj. Parto I*. Budapest: Országos Idegennyelvű Könyvtár, 542 p.
- Pei, Mario (1968): *One Language for the World*. New York: Biblio and Tannen, 291 p.
- Perrenoud, William (2002): IALA: Conférence de recherches linguistiques. Meeting of Linguistic Research. Procès-Verbaux. Genève, 20 Mars–3 Avril 1930. Editoris kun antaŭparolo, indekso, notoj kaj bibliografio Reinhard Hauptenthal. Schliengen: Edition Iltis, 158 p.
- Philippe, Benoît (1991): *Sprachwandel bei einer Plansprache am Beispiel des Esperanto*. Konstanz: Hartung-Gorre, 362 p.
- Phillipson, Robert (1992): *Linguistic Imperialism*. Oxford: Oxford University Press, 365 p. [*IpI* 21, *IntI* 23].
- Phillipson, Robert (2003): *English-only Europe?* London–New York: Routledge, 240 p. [*IntI* 46, *IpI* 45].
- Pinter, Ana-Maria (1999, Red.): *Kybernetische Pädagogik. Klerigkibernetiko. Einführende, weiterführende und wertende Schriften. Enkondukaj, progresigaj kaj pritaksaj tekstoj von/de Helmar G. Frank*. Dobřichovice/Praha: KAVA-PECH, München: KoPäd, 1159 p. (Listo de publikaĵoj de Helmar Frank: p. 1133-1141).
- Piron, Claude (1994): *Le défi des langues: Du gâchis au bon sens*. Paris: Éditions L'Harmattan, 334 p. [*IpI* 10-11, *IntI* 13-14].
- Pluhař, Zdeněk (1999): "Tom da historio de AEST". En: Malovec 1999, p. 9-13.
- Pluhař, Zdeněk (2001, Red.): *Fakaj aplikoj de Esperanto*. (Aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko, 2). Dobřichovice: KAVA-PECH, 157 p. [*IpI* 39].
- Pluhař, Zdeněk (2003, Red.): *Fakaj studoj en Esperanto*. (Aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko, 3). Dobřichovice: KAVA-PECH, 145 p.

- Rašić, Nikola (1994): *La rondo familia. Sociologiaj esploroj en Esperantio*. Pisa: Edistudio, 192 p. [*Ipl* 17]
- Régulo Pérez, Juan (1992): *Rikolto*. Editoris Reinhard Haupenthal kaj Gaston Waringhien. Chapecó (SC)-Brazilo: Fonto, 596 p. [*Ipl* 4].
- Rondo Takács (1992): *Inventaro de planlingvistikaj periodaĵoj*. Sant Pau d'Ordal: Hispana Esperanto-Muzeo, 123 p.
- Sakaguchi, Alicja (1998): *Interlinguistik. Gegenstand, Ziele, Aufgaben, Methoden*. Frankfurt/M. et al.: Peter Lang, 492 p. [*Ipl* 25, *Intl* 27].
- Schubert, Klaus (1989a, Ed.): *Interlinguistics. Aspects of the Science of Planned Languages* (Trends in Linguistics. Studies and Monographs 42). Berlin-New York: Mouton de Gruyter, 348 p.
- Schubert, Klaus (1989b): "Interlinguistics – its aims, its achievements, and its place in language science". En: Schubert 1989a, p. 7-44.
- Schubert, Klaus (1996): "Zum gegenwärtigen Stand der maschinellen Übersetzung". En: Becker 1996, p. 14-33.
- Schubert, Klaus (1999): "DLT: Resuma raporto". En: *Ipl* 8, N-ro 28 (1/99), p.1-3.
- Schubert (2001, Ed.): *Planned Languages: From Concept to Reality. Interface*. Brüssel: Hogeschool voor Wetenschap en Kunst, 257 p. (anglaj resumoj en *Intl* 45, Esperanto-resumoj en *Ipl* 43).
- Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo. II. Esperantismo*. La Laguna: Universidad de la Laguna, 1987, 790 p. [*Ipl* 4].
- Silagi, Denis (1996): "Der Name 'Interlingua'". En: *Intl* 5, 20(2/96), p. 6-10.
- Skutnabb-Kangas, Tove (2000): *Linguistic genocide in education – or world-wide diversity and human rights? Mahwah-New Jersey-London: Lawrence Erlbaum Ass., 785 p. [*Ipl* 35, *Intl* 35]*.
- Smith, Karin/Haake, Susan (1978): *Catalog of the George Alan Connor Esperanto Collection*. Oregon: University of Oregon Library, Special Collections Division, 120 p.
- Steiner, Hugo (1957): *Katalogo pri la kolektoj de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien. Parto I. Sistema katalogo pri la Esperanto-presaĵoj laŭ la Internacia Dekuma Klasifiko*. Wien: Internacia Esperanto-Muzeo/Österreichische Nationalbibliothek (nepaĝumita).
- Steiner, Hugo (1958): *Katalogo pri la kolektoj de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien. Parto II. Sistema katalogo pri la presaĵoj de la Ne-Esperanto-Artefaritaj Lingvoj (Volapük, Ido, Interlingue, Interlingua ktp.) laŭ la Internacia Dekuma Klasifiko*. Wien: Internacia Esperanto-Muzeo/Österreichische Nationalbibliothek, 93 p.
- Steiner, Hugo (1969): *Alfabeto katalogo pri la kolektoj de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien. Parto I (Literoj A-L de la verkoj troveblaj en la*

- biblioteko, escepte la gazetojn*). Wien: Internacia Esperanto-Muzeo en Wien, 462 p.
- Stenström, Ingvar (1997): *Occidental-Interlingue. Factos e fato de un lingua international*. Varberg: Societate Svedese pro Interlingua, 40 S. (Bibliografio de la publikaĵoj en Occidental-Interlingue: p. 28-34, represita en *Ipl* 45).
- Stillman, Robert E. (1995): *The New Philosophy and Universal Languages in Seventeenth-Century England: Bacon, Hobbes, and Wilkins*. Lewisburg: Bucknell University Press; London: Associated University Presses, 359 p. [*Ipl* 28, *Intl* 30].
- Stocker, Frank (1996): *Wer spricht Esperanto? Kiu parolas Esperanton?* München-Newcastle: Lincom Europa, 150 p.
- Stojan, Petr E. (1929/1973): *Bibliografio de Internacia Lingvo*. Genève: Universala Esperanto-Asocio, 560 p. (Enkondukoj en la lingvoj franca, germana, angla, Esperanto). (Represo: Hildesheim: Olms, 1973).
- Strasser, Gerhard F. (1988): *Lingua Universalis. Kryptologie und Theorie der Universalsprachen im 16. und 17. Jahrhundert*. Wiesbaden: Harrassowitz, 291 p.
- Symoens, Edward (1989): *Bibliografio de universitataj kaj altlernejaj diplomverkoj, disertacioj kaj tezoj pri Esperanto kaj interlingvistiko. Bibliographie: Thèses et dissertations universitaires ou d' instituts superieurs sur l'espéranto et l'interlinguistique. Dissertations and theses on Esperanto and interlinguistics: A bibliography*. Rotterdam: Universala Esperanto Asocio, 160 p.
- Symoens, Edward (1995): *Bibliografio de Disertacioj pri Esperanto kaj Interlingvistiko. Suplemento*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 63 p.
- Szerdahelyi, István (1977): *Bábelről a világnyelvig*. Budapest: Gondolat, 415 p.
- Szerdahelyi, István (1980, Red.): *Miscellanea interlinguistica*. Budapest: Tankönyvkiadó, 513 p.
- Takács, Jozefo (1934): *Katalogo de la Esperanto-gazetaro*. Jablonné n. Orl.: Ant. Prařák, 166 p.
- Tauli, Valter (1968): *Introduction to a theory of language planning*. Uppsala: Almqvist & Wiksells, 227 p.
- Tonkin, Humphrey (1977): *Esperanto and International Language Problems: A Research Bibliography*. Washington: Esperantic Studies Foundation, 45 p.
- Tonkin, Humphrey (1997, Ed.): *Esperanto, Interlinguistics, and Planned Language*. Lanham–New York–Oxford: University Press of America/ Rotterdam-Hartford: Center for Research and Documentation on World Language Problems, 232 p. [*Intl* 27].
- Tonkin, Humphrey/Fettes, Mark (1996): *Esperanto Studies: An Overview*. Esperanto Document 43a, Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 16 p.

- Umeda, Yosimi (1987, Red.): *Plena Raporto. Socilingvistikaj Aspektoj de la Internacia Lingvo – kun aparta konsidero pri la lingva diverseco en la mondo. (Internacia Simpozio honore al la Centjara Jubileo de Esperanto, 5.-7.8.1986, Tokio)*. Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 205 p. [En la japana kaj Esperanto].
- Vatré, Henri (1988): *Indekso por la nica literatura revuo (1955/56–1961/62)*. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 16 p.
- Vitali, Daniele (1998, Red.): *La linguistica, le lingue pianificate e l'Esperanto. Centodieci anni di storia*. Speciala eldono de “l’esperanto” (Roma), 29, Nr.3, 80 p. [*Ipl* 25, *IntI* 27].
- Wandel, Amri (1998, Red.): *Internacia Kongresa Universitato, 1-7 aŭgusto 1998, Montpellier, Francio*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 88 p.
- Waringhien, Gaston (1989): *Lingvo kaj vivo. Esperantologiaj eseoj (Dua reviziita eldono kun apendico)*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 452 p. [1-a eldono: 1959].
- Wells, John C. (1978): *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 76 p. (germana traduko: (1987): *Linguistische Aspekte der Plansprache Esperanto* (El Esperanto tradukis Günther Becker), Saarbrücken: Saarländischer Esperanto-Bund, 101 p.
- Wojtakowski, Edward T. (1979): *Decimala katalogo de la planlingva literaturo ĉe universitata biblioteko de la Katolika Universitato en Lublino (K.U.L.). Katalog dziesiętny księgozbioru esperanckiego w bibliotece uniwersyteckiej K.U.L.* Romo-Lublino: I.K.U.E.-Centro, 303 p.
- Wood, Richard E. (1982): *Current Work in the Linguistics of Esperanto*. Esperanto Documents 28 A. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 47 p.
- Wüster, Eugen (1931): *Internationale Sprachnormung in der Technik. Besonders in der Elektrotechnik. (Die nationale Sprachnormung und ihre Verallgemeinerung)*. Berlin: VDJ, 507 S. [3-a eldono 1970, Bonn: Bouvier.]
- Triono de la verko koncernas planlingvojn.

Tiu ĉi dokumento celas plifaciligi la aliron al fakliteraturo, atentigante pri la multspecaj materialfontoj, kiujn indas eluzi por interlingvistikaj kaj esperantologiaj esploroj. Krom monografioj, tio aparte koncernas malpli konatajn antologiojn, festlibrojn, konferencaktojn, universitatajn disertaciojn, krome iom novajn kaj malpli novajn planlingvajn periodaĵojn. Ĝi i.a. mencias ĝeneralajn kaj specialajn interlingvistikajn bibliografiojn, bibliografie orientitajn bultenojn kaj periode aperantajn internaciajn bibliografiojn kun interlingvistikaj sekcioj.

DETLEV BLANKE (1941-) doktoriĝis (1976) kaj habilitaciis (1985) pri interlingvistikaj temoj; instrukomisiito pri interlingvistiko en Humboldt-Universitato (Berlin), prezidanto de *Gesellschaft für Interlinguistik e.V.*, ano de la redaktaj komitatoj de *Language Problems & Language Planning (LPLP)* kaj *Esperantologio – Esperantic Studies (EES)*, estrarano de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED).

Sur la kovrilo